

Ora Ĵurnalo

Numero 52, Junio–Julio 2022



Magazino por kulturo kaj plezuro

Bonvolu viziti nian retpaĝon:

www.esperanto-gbg.org

Enhavo

Enhavo.....	2	”Svedaj kurtenoj”, kio estas tio?.....	22
Pri Ora Ĵurnalo.....	2	Heredontoj.....	23
Espeporko meditas.....	3	La fuĝo antaŭ la rusoj 1945.....	24
Enigmo.....	4	Politiko kaj ĉiutaga vivo	27
Tulipoj de Pollando. Lucyna el Gdansko skribas	4	En la ”Arda Seĝo” demandoj al Tony Johansson.....	27
Blåsväder – Venta vetero	5	Centjara jubileo memore al la naskiĝo de Povel Ramel (1922–2007)	29
Störst av allt är kärleken – La plej granda el ĉio estas la amo	5	Esperantaj ĵetkuboj.....	30
La plej ŝatata hobbio de la esperantistoj en Gotenburgo estas birdobservado	6	De Axel Engdahl ĝis Per Andersson aŭ Pri humuro oni ne ŝercu	30
La birdobservanto Stig Fredriksson – kelkaj vortoj pri si mem.....	10	Axel Engdahl – La Gotenbarga Ernst Rolf	31
Notu la somerajn kolorojn!	10	Signaloj el Marso.....	32
”Ostindiefararen” denove survoje al Ĉinio ..	11	Universo	33
Somermemoro el 2015	11	Universo, kiu vi estas? – Universum, vem är du?	34
La sveda nacia tago, la 6an de junio, 2022 ..	12	Afrika poligloto.....	35
La internacia tago de biologia plureco, la 22an de majo.....	13	Konsilo por pli sana vivo	36
Abeloj	13	Kiel servi fruktojn kaj legomojn?	36
Grenoj en Svedio	15	Kanti en koruso	37
AXA – la granda laborejo.....	16	Wasa-lauf – kio ĝi estas?.....	38
Vojaĝo per trajno kaj aŭtobuso al lagbordo de Vänern.....	16	Dum la tago de la malsupreniro de Sankta Spirito, Aira Kankkunen.....	39
La skisaltejo de Hindås. Svante Jarenskog informas.	17	Agendo de la sekvaj eventoj en franca Esperanto-kastelo Greziljono.....	42
La Ruĝgorĝa Kolimbo. Valle Jarenskog rakontas.....	18	Esperanta semajno en Klint, Danio el ”Informo”	43
Merlo.....	19	Esperanto sur la strando.....	44
Nacia parko Pyhä-Luosto norde de la Arkta cirklo	19	Aĉetu la Centran Oficejon.....	44
		Sommarpoesi	45

Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo por subteni la esperantobibliotekon en Stannum, Östadsvägen 68.
Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, siv.burell@gmail.com kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, ingegerd.granat@gmail.com.

Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström, arendsian@hotmail.com.

Kontaktu iun el la redaktantoj kiam vi volas viziti la bibliotekon.

Limdato por manuskriptoj estas la 1:a en ĉiu monato. Ni deziras kontribuaĵojn pri kulturo, naturo, lingvo, vivstilo, sano, manĝaĵo kaj rakontoj en diversaj temoj.



Espeporko meditas



- ☼ **Nia nacia tago** estas festita la 6an de junio. Ĝi antaŭe estis festita kiel "sveda flagtago". Ĝi akiris statuson kiel nacia tago en 1983. Ĝis tiam, Svedio estis unu el la malmultaj landoj en la mondo al kiuj mankis oficiala nacia tago.
- ☼ **Somermezo** male estas festita jam de paganaj tempoj.
- ☼ La **5an de junio** oni donas atenton al la **mondmedia tago**. La 22a de majo estis la **tago de biologia plureco**. Ho, kiom da memortagoj estas???
- ☼ Dum la printempo ĉiun lundon estis zoomkurso. Tri el la partoprenintoj, Svante, Valle kaj Jan nun kontribuas al Ora Ĵurnalo per artikoloj. Temas pri skisaltejo, **pri kolimboj kaj pri trajnvojaĝo. Ili skribis esperante. Mi ĝojas!**
- ☼ Birdaj priskriboj oftas en Ora Ĵurnalo. Alia fluganta besteto estas la **abelo**. Roger klarigas la kutimojn de tiu inteligenta estaĵo.
- ☼ **Ĉu vi povas distingi inter sekalo kaj hordeo?** Kompreneble jes ...aŭ?? Ukraino estis unu el la plej grandaj eksportantoj de greno, sed pro la milito la transportoj malfaciliĝas.
- ☼ **Serioza estas la poemo de Riksablo kun bildo de bunkro/ŝirmejo**. Se mi devus elekti, mi preferus fariĝi evakuita. Sidi en ŝirmejo tagojn kaj noktojn – terura penso!
- ☼ Serioza ankaŭ estas la raporto de Walter Klag **pri la longa fuĝo for de rusaj soldatoj fine de la dua mondmilito**. Bedaŭrinde la temo denove kaj denove aktualas.
- ☼ Malgraŭ ke nia digitala libroronda legaĵo el **"Sur bluaj planedoj"** estas sciencfikcia, ĝi donas al ni la senton ke vivo sur la tero estas en granda danĝero pro nia misuzo de la mondaj rimedoj.
- ☼ **Signaloj de Marso** – pri tiuj ni povas legi en "Lingvo Internacia" de **1897**. Pri la universo multo estas skribita nuntempe.
- ☼ Unu el la kontribuantoj al Ora Ĵurnalo, **Espoir Kasati, ricevis ateston pri sia poligloteco**. Li regas multajn lingvojn. Gratulon, Espoir!!!! Bedaŭrinde nun estas krizo inter DR Kongo kaj Ruando. Kiam Espoir povos vivi trankvile en sia lando Kongo?
- ☼ Fariĝi **distristo estas defio**. Ni nun festas la 100-jaraĝon de unu el la plej konataj distristoj en Svedio – **Povel Ramel (1922–2022)**. Li verkis revuojn, komponis, kantis, estis komikisto, pianisto kaj artisto. Neniām stultaj ŝercoj. Li ludis per vortoj, li surprizis nin per sia kolrompaj turnoj kaj liaj manoj dancis sur la pianoklavaro.
- ☼ Du gotenburgaj distristoj – unu antaŭ ol Povel, nome **Axel Engdahl**, la alia ankoraŭ aktiva, **Per Andersson** – pri ili Ingegerd skribis. Ilia humuro donas al Gotenburgo reputacion esti la urbo de bonhumoro kaj ridoj.
- ☼ **Somerlegaĵo**: novelo de Aira Kankkunen.
- ☼ **La venonta numero de Ora Ĵurnalo venos en aŭgusto**. Se mankas al vi magazino en julio, vi povus relegi pli malnovajn revuojn kaj eble mem skribi artikolon kaj sendi al ni. /Siv

Enigmo

Kie en la Ora Ĵurnalo estas la kvara pilono?

Foliumu kaj trovu!

/Ingegerd



Tulipoj de Pollando. Lucyna el Gdansko skribas:

”Mi sendas al vi kelkajn memorfotojn de nia ekskurso apud Gdansko por kolekti tulipojn.

Same kiel en Nederlando ni ankaŭ havas plantejojn de tulipoj. Sur tiuj plantejoj ni mem kolektas tulipojn. Ĉiujare ĉu estas bona aŭ malbona vetero, ni vizitas tiujn plantejojn.

Tiun ĉi jaron estis belega vetero. En tiu regiono estas sufiĉe multe da plantejoj de tulipoj.

Finfine fariĝis vere printempa vetero kaj mi povis planti florojn sur mia balkono kaj jam estas bele.

Ni kore salutas vin kaj ĉiujn Esperantistojn en Gotenburgo!

Lucja kaj Marek.”

Kia plezurdona ĝardeno! La gotenburgoj dankas vin! /Siv





Blåsväder

Blåsväder,
stormvarning,
det gungar!

Rädslans rop
fly vartåt
till vems famn.

Så stilla
hjärtats ton
söker dig.

Varsamt ljus
omsluter
mörkret flyr

Bästa vän
stanna kvar
ljus ger liv.

Venta vetero

Venta vetero
ŝtormaverto
balanciĝas!

Timanta voko
fuĝi kien
al sino de kiu.

Tiel kvieta
la tono de koro
serĉas vin.


Zorgema lumo
ĉirkaŭas
la mallumo fuĝas

Plej bona amiko,
restu
la helo donas vivon.

Störst av allt är kärleken

Mitt i sjön, långt bort från
land,
simmar ett gråhakepar
leker och gläds med varann.

Se på himmelens fåglar
en uppmaning ur en bok,
störst av allt är kärleken.



La plej granda el ĉio estas la amo

Meze en la lago, for de bordo
naĝas paro de grizgorĝulo
ludas kaj ĝojas kune.

Vidu la birdojn de ĉielo,
admono el libro,
La plej granda el ĉio estas la amo.

Renate Säfsröm, la granda fotistino kiu havas specialan intereson por birdoj. Ŝi faras tre bonegajn fotojn kaj partoprenas en ekspozicioj kelkfoje por montri siajn belajn bildojn. Ni en la redakcio estas dankemaj ke ŝi kontribuas en Ora Ĵurnalo. Dankon, Renate!



Vizitu ŝian belegan retpagon:

<https://www.fotoforlivet.com/>



La plej ŝatata hobbio de la esperantistoj en Gotenburgo estas birdobservado

Esperanto ne estas hobbio, sed vivstilo!!!



La 26an de majo la jaŭda ekskurso de la birdobservantoj komenciĝis en Alingsås ĉe la vaporŝipa haveno. Stig Fredriksson, la gvidanto, venis la unua, sed poste Anita, Magnus kaj mi venis. S/S Herbert, la vaporŝipo, atendis 21 personojn. La tago estis unue pluveta kaj venta, sed poste "nur" venta – pli prave VENTEGA!

Nun la kanalo de la urbo al Mjörn estas sufiĉe

profunda por lasi Herbert veturi en la sufiĉe grandan lagon Mjörn. Oni foje devas dragi, por ke Herbert ne estu kaptito en la haveno.

La kapitano Christian, suprengrimanta de la maŝinejo, diras ke ni ne povos albordegi al la insulo Riso, pro la ventego. La insulo nomiĝas (tradukite) "La respubliko de Risö" kun "prezidento", reguloj kaj ceremonioj, ĉefe por ĝuigi velistojn, kiuj vizitas la insulon somere. Neniu persono loĝas sur la insulo



Magnus, Anita kaj mi preparintaj por renkonti pluvon kaj ventegon.

– nur birdoj.

Ĉu ni vidis birdojn?? Jes amasojn. Almenaŭ la aliaj. Mi ĉefe vidis "vita gäss" sur la lagego. Kiam la ondoj havas blankajn krestojn pro ventego, oni svede diras ke sur la akvo estas "blankaj anseroj".

Troviĝas birdorokoj, insuletoj kaj grandaj insuloj, kiuj foje donis al ni malventajn flankojn.

Malgraŭ la vetero la grupo povis spekti multajn birdojn. Anna, kiu sidis ĉe mia flanko notis la diversajn birdojn kiujn iu vidis. Mi skribis la samon, eĉ se mi ne vidis ilin, pensante ke hejmenirinte mi konsultu birdolibron por ekscii kiujn mi ja estis devinta vidi en tia interesa vojaĝo. Jen ŝia listo: griza mevo, arĝentmevo (ilin ja mi malfacile dividas unu



de la alia), platbeka anaso, monedo, granda paruo, kanada ansero, cigno, tufgrebo, murhirundo, apuso, kamphirundo, granda merĝo, kaj pandiono kaj fiŝaglo. Eble ankaŭ hematopo.

Por nia mendita trihora veturado sur Mjörn, la vaporŝipo "glutas" tri sitelojn da karbo. (Neniu kuraĝis paroli pri la medio 😊).



La flago flirtis, la nuboj velis kaj Herbert sekure portis nin.

Kongo estas "ĝangalo" proksime al Alingsås (bildoj en sekva paĝo). Sur lignaj mallarĝaj longaj pontoj ni studis la vivon de birdoj, en arbaro kun marĉoj kaj densaj arboj kaj multe da nestokestoj. Tie la birdoj en unu nestokesto havis viziton de granda buntpego, kiu per sia beko faris profundan truon, sed verŝajne ne tra la tuta vando. Devas troviĝi birdidoj ene, ĉar eta birdo elflugis kaj revenis kaj denove elflugis. Ekis debato ĉu ĝi estas longvosta paruo, aŭ ne.



Je la fino de la vojaĝo, dum laŭlaga promeno, ni vidis du vanelojn, kiuj iritigante flugis ĉirkaŭ du kanadaj anseroj havante siajn idojn inter si. La nesto de la vaneloj eble estis en la proksimeco.

Post interesa veturo Stig parolas al sia grupo kaj faras komunan foton. "Ĉu iuj volas veturi kun mi al Kongo?", li demandas. Kompreneble – jes!



Koran dankon, Stig, pro interesa tago! Vi inspiris min provi lerni almenaŭ pri unu aŭ du birdoj tage – ne nur rekoni "blankajn anserojn". 😊 /Siv



Ĉu ĉi tiu insulo estas Risön? Kredeble jes, sed la kajponto verŝajne troviĝas sur la alia flanko.



"Kongo"



La birdobservanto Stig Fredriksson – kelkaj vortoj pri si mem

Mi petis al Stig Fredriksson skribi kelkajn liniojn pri si mem. Antaŭ ol mi aniĝis al GOF – la gotenburga ornitologia asocio – mi aŭdis pri Stig, kun la karesnomo "Natur-Stig". La namo/vorto STIG ankaŭ signifas "PADO", nomon kiun li enmetis en sian e-poŝtadreson.



"Mi estas pasia pri birdoj ekde mi estis infano. Mi estas tre feliĉa pro tio, ne ĉiuj malkovris ke ni estas ĉirkaŭitaj de birdoj, ĉie. Mi estas membro de GOF (Gotenburga Ornitologia Socio) ekde kiam mi venis al Gotenburgo antaŭ 56 jaroj.

Agadoj por tiuj kiuj havas liberajn labortagojn estis komencitaj en 2008 de la tiama prezidanto Stina Thelander. Estis brila ideo, kiu falis sur bonan teron, kaj plaĉas al 300 membroj ĉiujare.

Multaj talentaj birdobservantoj montras birdojn. Estas konstante daŭranta studrondo. Ĉiuj malkovras novajn belajn naturajn areojn samtempe." /Stig

Notu la somerajn kolorojn!

Ankaŭ la gotenburgajn koloristojn...

Dum la amata somero estas bona tempo por rigardi kaj mediti pri la Gotenburgaj koloristoj. Relegu pri ili en la numeroj 44–47 en Ora Ĵurnalo.

/Ingegerd

Multaj ekskursoj celas la okcidentan marbordon, aliaj okazas en arbaroj kaj eĉ en parkoj. Sur la dekstra foto li eble estas faranta ringumi grandan buntpegon. Li invitis nin partopreni en la ringumado en Slottsskogen, parko en Gotenburgo. /Siv



"Jag har varit passionerad av fåglar sedan jag var barn. Detta är jag väldigt glad för, alla har ju inte upptäckt att vi är omgivna av fåglar, överallt. Jag har varit med i GOF sedan jag kom till Göteborg för 56 år sedan.

Aktiviteter för Vardagslediga startade 2008 av dåvarande ordföranden Stina Thelander. Det var en lysande idé som föll i god jord, den förnöjer 300 medlemmar varje år.

Många duktiga fågelskådare visar fåglar. Det är en ständigt pågående studiecirkel. Alla upptäcker nya fina naturområden på köpet." /Stig



Inge Schiöler

”Ostindiefararen” denove survoje al Ĉinio



Bildo: Dag Fransson.

”Ostindiefararen” – la muzeoŝipo por Orienta Azio – forlasis Gotenburgon la 8:an de junio ĉe la 16:a h, dumtempe okazis salutoj kaj festadoj por la unua fojo post la unua vojaĝo en 2005.

La vojaĝo daŭros dum unu jaro kaj la ŝipo vizitos havenojn en Oslo, Kopenhago, Helsingborgo, Helsinko kaj poste laŭlonge la eŭropaj marbordoj al la Mediteraneo por travintri. En Marto 2023 la vojaĝo daŭriĝos al la Suezkanalo kaj la celo estas Ĉinio, por la dua fojo!

Restante en Gotenburgo ni ĉiuj atendas la ŝiprevenon.

Dag Fransson sidas sur sia balkono kaj pensas pri la unua fojo, kiam li vojaĝis kiel ĵurnalisto sur la ŝipo Götheborg. Se vi volas legi pri la unua vojaĝo, legu en numero 43 de Ora Ĵurnalo.

http://www.esperanto-gbg.org/oraklubo/Ora_Jurnalo_n-ro_43.pdf

Ni ĉiuj atendas la ŝiprevenon, estos granda festo!

/Ingegerd

Somermemoro el 2015

Ĝi estis nomita ”Blodomloppet”, la plej grava evento, kiun la kolektiva sanorganizo aranĝis en ”Slottskogen”. La gotenburgaj esperantistoj decidis fari tiun rondiron.

Oni promenu aŭ kuru sur vojeto ĉirkaŭ Slottskogen kun numerplato kaj ĉio, kio apartenas al sporta konkurso. Ĉi-jare aperis kaj subtenis la esperantistoj Mikael Engström, el la revuo Goda Nyheter (Bonaj Novaĵoj). Mikael laŭte kriis, kiel mirindaj ni estas en niaj verdaj T-ĉemizoj, do tiutage



Esperanto estis krianoncita tiel ke eĥis en Änggårdssbergen. La vetkuro finiĝis per medalo, sporta T-ĉemizo kaj lunĉsako sub arbo.

La celo de la "Sangocirkulado" estis akiri pli da sango-donacantoj kaj tio, oni devas diri, estas vere subteninda. Ĉiokaze ĝi estas agrabla memoro kaj memorigo pri kiom grave estas sperti aferojn kune en asocio.

/Ingegerd



La sveda nacia tago, la 6an de junio, 2022

Svedoj ne eŭforas same kiel la norvegoj pri sia Nacia tago (la 17an de majo en Norvegio). Tamen ŝajnas ke post la pandemio kaj pro la milito en Ukrainio, ni pli alte taksas naciajn memortagojn. Mi estis en Mölndal en la 6a de junio, kie troviĝis granda popola festo. Samtempe Mölndal ("eta najbaro de la 400-jara Gotenburgo") celebras sian 100-jaran jubileon. En 1922 ĝi ricevis sian urban privilegion.



Oni ĵus hisis la flagon kaj ni ĵus kantis nian nacian himnon.



Knabinoj en ruĝaj uniformoj svingis siajn blankajn bastonetojn. Preskaŭ neniu faligis sian bastoneton.

Mia najbarino, Juhaina, invitis min al Mölndal. Ŝi kantas en koruso kun kaj svedoj kaj sirianoj. La verdaj ŝaloj memorigas min pri la litova grupo, kiujn ni, naŭ gotenburgaj esperantistoj, renkontis en Pollando en 2018.

La programo daŭris dum pli ol tri horoj. Orkestro post orkestro, parolado post parolado, kantado post kantado, familioj kiuj piknikis, infanoj, kiuj kuris kaj manĝis bombonojn. Ho, kia festo!

En la antaŭa artikolo –"Somermemoro," vi vidas Juhaina starante kiel la duan de dekstre. Ŝi estas, laŭ mi, bona reprezentanto de enmigrintoj, kiuj kombinas du kulturojn – kaj krome ankaŭ ŝatas Esperanton. /Siv



La internacia tago de biologia plureco, la 22an de majo

Entute laŭ oficiala kalkulo ĉirkaŭ 1 miliono da bestoj kaj herboj vivas danĝere – de etaj insektoj ĝis grandaj mamuloj. Ankaŭ la plureco de herboj estas enkalkulita en la minaco de ekstermo.

La Scienca Panelo pri Biologia Diverseco de UN (IPBES) deklaras ke naturo kaj biodiverseco estas streĉita ĝis la rompopunkto.

Nia civilizacio rekte aŭ nerekte dependas de biodiverseco, sed nia vivmaniero disŝiras ĉi tiun sekurecan reton. Sed raportoj de IPBES ankaŭ deklaris, ke protekto kaj restarigo de naturo estas gravaj partoj de la solvoj kaj por la klimata krizo kaj por la homaro.

Temas pri minaco fare de homaj aktivecoj – malmultigo de ekvatoraj arbaroj, sekigo de malsekterenoj kaj malpurigo de akvo kaj aero.



Långhornsbi (abelo kun longaj kornoj) estas unu el la insektoj, minacataj de ekstermo.

Ĉio tio kompreneble influas ankaŭ nin. Se la militoj ne malmultigos nin, nia malpurigo de la medio faros tion.

/Siv

Abeloj

De Roger Nilsson

Abeloj estas malgrandaj estaĵoj, kiuj neniam ĉesas mirigi nin. La mielabelo aŭ *Apis mellifera* estas la plej devastigita specio en la mondo kaj tial la plej studita kaj observita de biologoj.

Tiuj bestoj (kiel ekzemple vespoj) apartenas al la kategorio de himenopteroj. La abelo havas vere superan inteligentecon kompare kun aliaj insektoj. La mensokapabloj de abeloj estas tre evoluintaj kaj ĉi tiu faktoro ŝuldiĝas al forta evolua evoluo laŭlonge de la tempo.

Laŭ kelkaj hipotezoj, la cerboj de la himenoptero ĝenerale adaptiĝis al la bezono




fari rapidajn decidojn dum la flugo. Ĉio ĉi igis la prilaboradon de vidaj informoj rapida kaj

tre komprenema. Abeloj estas inteligentaj estaĵoj.

Ĉu abeloj rekonas kolorojn kaj formojn?

Laŭ iuj studoj, la cerboj de abeloj povas asimili kaj prilabori eĉ pli kompleksajn pensojn. Memoru, ke ni parolas pri insektoj, kiuj havas neŭronan strukturon anatomie diferenca de la homa cerbo. Tial, la rezultoj de kompreno kiel tiuj, kiujn ni rakontos al vi, estas vere signifaj por simplaj insektoj.

Studoj montris, ke ĉiu abelo kapablas verajn matematikajn kalkulojn! Ŝajnas, ke ili povas distingi la koncepton de "nulo" kaj asimili kaj asocii simbolojn kaj nombrojn. Ne estas hazardo, ke abelbredistoj metas specialajn simbolojn sur la abelujojn ĉar ĝi ŝajnas multe helpi la abelojn pri la orientiĝo.



Bildo de Apicoltura Laterza, Italio.

La simboloj, kiujn enmetas abelbredistoj, estas konkavaj kaj nekonvexaj figuroj. Ekzemple, abeloj povas klare rekoni X sed ne kvadraton aŭ triangulon.

Koloroj ankaŭ estas gravaj por abeloj. Kiam estas abelujoj aranĝitaj unu apud la alia, estas ankaŭ tre grave pentri ilin diverskoloraj. Tiel eblas helpi la abelojn orientiĝi kaj distingi sian hejmon.

La koloroj kiujn la abeloj perceptas estas: flava, bluverda, blua kaj ultraviola (nevidebla por ni homoj). La nura koloro, kiun ili simple ne povas vidi, estas ruĝa. Neniam pentru abelujojn en ĉi tiu koloro aŭ similaj nuancoj.

Se abelo revenus al la malĝusta abelujo, estos problemo! Se ĝi estus laboranta abelo kun

bela ŝanĝo de nektaro kaj poleno, ne estus gravaj problemoj. Abeloj amas kunlabori kaj feliĉas akcepti alian laboron.

Okaze de abelreĝino revenanta de geedziĝo aŭ orientiĝa flugo, la situacio estus tre malsama. En ĉi tiu kazo, vere estus granda danĝero aliri la malĝustan tason ... se la reĝino enirus la malĝustan tason, ŝi certe estus mortigita.

Abeloj povas parkerigi vizaĝojn

Inter la plej mirindaj kapabloj, kiujn ni lernis pri abeloj, vere estas ilia kapablo rekoni vizaĝojn. Ili povas asimili certajn kolorojn kaj formojn kaj tial ili povas ankaŭ rekoni la homan vizaĝon!

Ĉi tio ne signifas, ke abeloj scias kiel distingi vian vizaĝon de tiu de alia homo, sed ili povas simple enmemorigi ĝian strukturon kaj kompreni, ke tiu ŝablono de formoj estas ligita al homa vizaĝo.

La eksterordinaraj kapabloj de abeloj

La mensaj kapabloj de abeloj estas multe pli evoluintaj ol ĉe aliaj insektoj. Krom havi pli kompleksajn motorkapablojn, abeloj havas vere eksterordinaran formon de inteligenteco. Biologoj asertas, ke ĉi tiuj insektoj povas lerni de siaj eraroj kaj komuniki kun la resto de la svarmo en absolute mirinda maniero. La membroj de abelfamilioj estas multaj kaj tamen la lingvo de komunikado, per kiu ili devas transdoni informojn, estas vere efika. Abeloj rafinis sociajn kapablojn.

La maniero, kiun ili uzas por komuniki kun la cetero de la kolonio, estas simbola lingvo, speco de danco de ok diversaj turnoj per kiuj ili signalas al siaj kunuloj la vojojn por sekvi kaj la ĉeesto de floroj plenaj de poleno.

Sendepende de neŭrona denseco, la *Apis mellifera*-raso kaj iliaj kunuloj kapablas plenumi ekstreme kompleksajn taskojn kaj lerni kompleksajn gestojn.

Abeloj estas tre inteligentaj estaĵoj. Studo farita en konata universitato en Londono montris, kiel kelkaj himenopteroj sukcesis movi pilkon en truon por ricevi manĝaĵon.

La insektoj komprenis, ke enmetante la pilkon tien, ili ricevos rekompencan en formo

de manĝaĵo, tial ili tiam kunhavis la informojn kun aliaj insektoj en la sama familio kiuj poste konsentis pri tio. Ĉio ĉi montras la altan socian lernadon, kiun posedas ĉi tiuj insektoj.

Fonto: Apicoltura Laterza! www.apiculturalaterza.it

Grenoj en Svedio



VETE

Tritiko



KORN

Hordeo



RÅG

Sekalo



HAVRE

Aveno

"Dio, donu al ni nian ĉiutagan panon!"



AXA – la granda laborejo

En la jaro 1909–10, la distrikto Agnesberg ricevis novan avenmuelejon, ekster Gotenburgo. Ĝi situis proksime de la malnova pramterminalo ĉe Hisingen en la Göta Rivero. La posedanto de la muelejo tiam estis P-O Stockeby.

En 1922, la firmao Gyllenhammar transprenis la produktadon de avenfaruno, kaj en la 1930-aj jaroj ekzistis proksimume 100 dungitoj.

En 1959 "Kungsörnen" aĉetis la tutan muelejon kaj ŝanĝis la nomon al "AXA-kvarn AB".

En 1960 la nombro da dungitoj estis 60. Finfine, en 1979, la negoco ĉesis kaj la produktado translokiĝis al Järna en Sudermanio.

Tiel, la historio de la muelejo ĉe la rivero Göta estis, per kelkaj vortoj, resumita.

Ekzistis multaj en Agnesberg, kaj en proksimaj lokoj, kiuj gajnis sian ĉiutagan panon ĉe la muelejo en Agnesberg. Mi memoras kiam ĝi estis malestablita.



Mia onklo Sigvard, kiu loĝis kun sia familio en la proksima Surte, laboris ĉe la AXA-muelejo en Agnesberg.

/Ingegerd

Vojaĝo per trajno kaj aŭtobuso al lagbordo de Vänern

Jan Hellström skribas:

Ni veturas per trajno de Gotenburgo al Vänersborg.

Poste per aŭtobuso de la stacidomo en Vänersborg trans altan ponton kun bela panoramo sur la lago Vänern.

De la haltejo ni iras preter la muzebieneto Dalbogården kaj super rivereto, kiu estas la limlinio inter la provincoj Västergötland kaj Dalsland.





Ĉe la "arbostumpo de Kronblom" la pado Dalbostigen komenciĝas. La pado estas monteta laŭ la lago Vänern.

Ĉe la lumturo Bastungen ni manĝas nian provianton. Bela panoramo sur la lago kaj kontraŭ la monto Halleberg kaj la terkolo Vänersnäs.

Post ĉirkaŭ tri kilometroj ni estas ĉe la strando Ursand kaj ni lunĉas.

Eble ni iam veturos per boato al Vänersborg aŭ iros.

Komforte estas sidi en trajno reen al Gotenburgo. /Jan

La skisaltejo de Hindås. Svante Jarenskog informas.

Mi kaj Valle loĝas en Hindås. Ĝi estas malgranda vilaĝo proksimume tridek kilometrojn ekster Gotenburgo. Hindås estas konata kiel vilaĝo, kiu pli frue estis vintra sporta vilaĝo.

En la vilaĝo troviĝas du skisaltejoj, sed neniu el ili estas uzebla hodiaŭ.

La plej granda el ili altas je tridek metroj kaj longas sepdek kvin metrojn.

La alia skisaltejo estas malgranda kaj tial ne tre konata. Vi eble estas konfuzitaj ke Hindås havas du skisaltejojn, ĉar la vilaĝo ne estas la plej tipa loko por tiaj konstruoj. Sed fakte estas tre logike ke la skisaltejoj troviĝas ĉi tie.

Estas du precipaj kialoj de tio, kion mi nun rakontos al vi.

Unue, en la fino de la mil naŭcenta jarcento multe da homoj en Gotenburgo volis plibonigi sian sanon. Ili kredis ke la aero en la granda urbo estis malbona por ili kaj ili tial fartus pli bone en la kamparo.



Hindås kaj havis belan naturon kaj situis en la proksimeco de la urbo. Do, nova fervojo estis konstruita inter Gotenburgo kaj Hindås por ke la gotenburganoj povu viziti la belan naturon. Sed, tio ne sufiĉis por ili, ĉar ili ankaŭ volis sporti en la vilaĝo.

Bonŝance, Hindås sufiĉe altas super la maro, kaj tial ricevas multe da neĝo vintre kaj la vilaĝo tial estis taŭga por vintra sporto.

La dua grava kialo por la lokigo de la skisaltejoj estas ja jena: Ĝis la jaro mil naŭcent kvin Svedio kaj Norvegio estis en unio kune. En Norvegio troviĝas skisaltejo kiu

nomiĝis Holmenkollen kaj estis tre populara ĉe la gotenburganoj. Sed, post kiam la unio estis dissolvita la gotenburganoj ne povis sporti tie kaj ili bezonis novan lokon por skisaltejo.

Ili elektis Hindås, ĉar jam troviĝis fervojo al la vilaĝo kaj ĉar ĝi ankaŭ ricevis multe da neĝo vintre.

Do, la du skisaltejoj estis konstruitaj kaj, eĉ se ili ne estas uzeblaj hodiaŭ, ĉiuj kiuj loĝas ĉi tie amas ilin.

La Ruĝgorĝa Kolimbo. Valle Jarenskog rakontas.

La Ruĝgorĝa Kolimbo estas unu el kvin kolimbaj specioj en la mondo. En Svedio ĝi estas la dua plej ordinara kolimbo, post la arkta kolimbo. Distingilo estas la ruĝa gorĝo kaj la plenda sono.

La birdo ofte kovas idojn en arbaraj lagetoj sed fiŝkaptas en pli grandaj lagoj. La birdo manĝas preskaŭ nur fiŝojn kaj nur estas sur lando kiam ĝi kovas idojn.

En Svedio estas ĉirkaŭ tri mil ducent ruĝgorĝaj kolimboj sed oni povas vidi multe

da ruĝgorĝaj kolimboj flugi al lagoj en Rusio sur la suda marbordo.

La arkta kolimbo estas la plej ordinara kolimbo en Svedio, la arkta kaj la ruĝgorĝa kolimbo estas sufiĉe similaj. Ekzemploj de diferencoj estas ke la arkta kolimbo estas pli granda kaj ne havas ruĝan gorĝon. La arkta kolimbo kaj la ruĝgorĝa kolimbo ankaŭ havas malsamajn kantojn.



Merlo

Sur la foto, kiun mi faris en mia bieno "Ebersburg", vi vidas junan merlon (turdon?). Ĉar kato volis kapti ĝin, tri merloj kriegis kaj flugis supren kaj malsupren. La kato foriris malrapide.

Sur alia foto aperas la kato, fotita aŭtomate jam en marto.

/Walter Klag



Parenteze Walter skribis "turdo?".

Troviĝas multaj turdoj:

Rokturdo, rubando-turdo, merlo, griza turdo, kantturdo, ruĝaksela turdo, viskoturdo – kaj eble pliaj.

Se vi certas pri kiu turdo temas – bv. skribi al Ora Ĵurnalo!

Nacia parko Pyhä-Luosto norde de la Arkta cirklo

De Raita "Saliko" Pyhälä



Historie kaj geologie

La plej malnova nacia parko de Finnlando *Pyhä* estis fondita en 1938 en la komunumo *Pelkosenniemi*. En 2015 ĝi estis grandigita aligante al ĝi la monton *Luosto*. Tiu monta regiono antaŭ 300 kaj pli da jaroj estis konsiderata limo inter la Samea lando kaj Finnlando. Kaj *Pyhä*-monto kaj la monto *Luosto*

antaŭ du miliardoj da jaroj leviĝis alten kiel la Alpoj, sed dum la tempofluo ili eluziĝis pro la ripetiĝantaj Glaciaj epokoj, varmega suno, frostego, akvo kaj vento. Nun la suprajn deklivojn kovras disrompiĝinta ŝtonaro, la montoj altas malpli ol 600 metrojn.

Kiam la 2,5 kilometrojn dika glaciokovrilo de la lasta Glacia epoko degelis, la Balta Maro etendiĝis ĝis *Pyhä* kaj *Luosto*. Dum jarmiloj la akvo refluis suden laŭ *kuru*-valetoj, kiuj nun povas esti danĝeraj pro lavangoj kaj ŝtonŝoviĝoj. Kun la impona geologia historio oni povas konatiĝi en la Naturcentro *Naava* ĉe la piedo de *Pyhä*.

La finnlingva vorto "pyhä" nuntempe asociiĝas al religio, precipe al kristanismo kaj Biblio, sed estas supozite, ke la sameaj indiĝenoj uzis ian tian vorton pri la lokoj, kie ili sentis la grandiozon de la naturo kaj kie ili adoris siajn diaĵojn kaj oferis al tiuj. Fakte, en Laponio troviĝas pluraj *Pyhä*-montoj kaj en Finnlando pluraj *Pyhä*-lagoj kaj *Pyhä*-rivero. En la 17a jarcento enmigrintaj



misiistoj devigis la indiĝenojn ĉirkaŭ *Pyhä*-monto baptiĝi ĉe la fonto nun nomata la *Fonto de la sankta Bapto*. La akvo tien falas kiel mallarĝa alta kaskado de la supro de *Pyhä*-monto.

Nuntempa uzo de la nacia parko

Vintre venas multegaj feriantoj, kiujn logas slalomo, libera skiado malsupren laŭdeklive kaj transgrunda skiado piede de la montoj. Neskiantoj ŝatas iradi en la neĝo per rakedoj

(neĝoŝuoj). Ĉiuj volas vidi la Nordajn lumojn *Aurora borealis* aŭ almenaŭ la noktan priŝtelitan ĉielvolbon kaj lunon sen la artefaritaj lumoj de la urboj. Kelkaj turistoj volas provi tranoktadon en iglo (neĝodometo de inuitoj) aŭ ĉe

laavu, kiu estas malalta tegmento sur tri trabaj muretoj kaj larĝa benko por la dormantoj. Antaŭ ĝi brulas bivaka fajro, ĉe kiu oni povas kuiri, rosti, boligi kafon en fulga ŝtalpoto kaj varmigi sin, sekigi siajn ŝtrumpetojn kaj vestojn malsekajn pro ŝvito



aŭ neĝo. Troviĝas multaj entreprenoj kun sledhundoj kaj boacoj. Precipe hundara sledveturado plaĉas al vojaĝantoj. La hundoj ferias kaj ripozas somere, ĉar ili malsaniĝus, se ili kurus longajn distancojn en temperaturoj de 15 aŭ pli da gradoj C. Ili bezonas tempon ankaŭ por ludi, ĝui la vivon kaj naski kaj kreskigi siajn idojn.

En senneĝaj sezonoj en Pyhä oni povas bastonmarŝi, kuri laŭ padoj, bicikli en la arbaro per dikpneŭa biciklo. Aventuruloj biciklas malsupren laŭ la deklivoj, sur kiuj oni vintre skias kaj slalomas. Aliaj homoj aventuras grimpante sur la plej krutaj deklivoj sekure jungitaj. Unu el la novaj sportoj estas gruzobiciklado (angle *gravel-bike*). Pli tradicie grupoj kaj soluloj venas por konatiĝi kun la plantoj kaj bestoj de la nacia

parko. Ili volas ne ĝeni la naturon sed ĝui la silenton, fulmotondron, venton kaj la pepadon de birdoj. La ikona birdo de la parko estas la perisoreo, kiu facile alproksimiĝas kaj observas la venintojn. Aŭtune busplenoj da turistoj alveturas por vidi kiel la arboj kaj arbustoj ŝanĝas siajn verdojn al brilaj purpuro, ruĝo, oranĝo kaj flavo. Tion faras precipe betuloj, mirtelofolioj kaj malaltaj kornusaj herboj *Cornus suecica*. En la nacia parko Pyhä-Luosto oni povas trovi la tutan ĉarmon de Laponio. Ne malproksime situas ametista minejo, kie la vizitantoj rajtas mane fosi ametiston por si aŭ aĉeti surloke faritajn ornamaĵojn. La minejo estas neindustria.



En la Naturcentro Naava*

En Naava oni povas koncize sciiĝi pri la historio kaj geologio de Pyhä-Luosto. Troveblas komputilaj kvizoj kun bildoj kaj solvoj almenaŭ en la lingvoj finna, angla, franca pri la nordaj faŭno kaj flaŭro. Spekteblas belega filmo pri ĉiuj sezonoj en Laponio, kun trankvila muziko.

Gvidantoj respondas viajn demandojn kaj konsilas al vi, kiujn itinerojn elekti en la nacia

parko. Apude, en la kafejo-restoracio *Loimu* oni povas refreŝigi kaj nutri sin. Favorataj tradiciaj pladoj tie estas el salmo kaj boaco. Sur librobreto troviĝas arto, poezio, rakontoj, nefikcio.

En vitrinoj vidiĝas pejzaĝoj kun la plej kutimaj nordaj bestoj. Sub viaj piedoj kvazaŭ naĝas nordaj fiŝoj kaj lutro. Vi povas treti sur lignan padon, laŭ kiu vi kvazaŭ transiras marĉon. La 28an de aŭgusto Naava celebras pro sia 10-jariĝo kaj pro la Tago de la Finna Naturo.

Krome, en Naava oni povas pruntepreni ekipaĵojn por siaj sportaj ŝatokupoj.

**) Naava = likeno, kiu kreskas sur arboj en regionoj kie la aero estas tre pura. Boacoj ŝatas nutri sin per naava vintre, kiam la likenon sur la grundo kaŝas neĝo kaj glacio.*



Plej maldekstre: ŝtoniĝinta lagofundo. Montoj kaj valoj – grandaj altdiferencoj!



Fine: kelkaj el la dekoracioj de la Nacia Parko Pyhä-Luosto.

”Svedaj kurtenoj”, kio estas tio?

Walter Klag, kiu sendis la informon, klarigas:

”Svedaj kurtenoj”, germane ”schwedische [ŝvediŝe] Gardinen” estas ŝerca esprimo pri la feraj bariloj de malliberejo. Tiu parolturno, uzata jam ekde 1906, venas de la altkvalita, stabila sveda ŝtalo.



Fenestroj de malliberejo en Vieno.

Oni diras ankaŭ, ke la sveda aŭto "Volvo" estas aparte bona kaj longviva pro la sveda ŝtalo.

Mia komento: Unue, kiam mi legis la tekston de Walter kaj vidis la bildon, mi pensis: Kial oni nomas la kradon de malliberejo "kurteno". Kurtenoj ja ne baras al malliberuloj fuĝi. Multaj landoj ja kritikis Svedion pro nia "tro liberala" sinteno al krimuloj (sed ne jam en 1906). Tamen – ni ja kontentas pri la kvalito de la ŝtalo kaj estontece ankaŭ pri la senfosila ŝtalo produktado. Pri ĝi mi interrete trovis la jenon:

Grandskala senfosilia hidrogenproduktado estas la nova industria centro de Norrland Svedio. Unue estas la projekto "Hybrit", kiu jam en Luleå produktas senfosilian ŝtalon,

uzante hidrogenon. La venonta grava investo povus esti verda sterko, kaj en la haveno de Luleå, planoj estas faritaj por produkti hidrogenon grandskale.

Pasintjare "Hybrit" inaŭguris sian fabrikon por fari preparajn studojn en Luleå. Meze de oktobro ĉi-jare, la kamionproduktanto Volvo povis prezenti la unuan veturilon, memstirantan ŝarĝoportilon, konstruitan el senfosilia ŝtalo. /Siv



Foto: Volvo.

Heredontoj

Gekunulojn de l' despoto
nepre oni plene ŝirmu
kontraŭ ajna ĉielfloto;
do ke kavo, ni konfirmu,
jam en montan rokon estis
traborita tre profunde.
Honestuloj ja atestis,
ke en tiu kav' abunde
ja plenplenas manĝostoko
kaj brulaĵo kaj armiloj.
Ŝajne ankaŭ naĝoloko
por la distro de la filoj
de l' despot' troviĝas tie.
Ankaŭ kelkaj funkciuloj
por servadaj taskoj, plie,
havos litojn en anguloj.

Krome iuj plutokratoj
planas Nov-Zelanden fuĝi
Antaŭ kiam sur la stratoj
bomboj igos homojn muĝi.

Tial ni, la miliardoj,
kies sorto morto estos
klare eĉ sen trarigardoj
scias ĝuste kio restos.

Regos teron kiaj uloj?
Kiu povos rekonstrui?
Tiu kulpaj fitrompuloj,
kiuj provis ĝin detrui.


Riksablo, Leeds, 12/5/2022.



La "Barnton Bunker" apud Edinburgo.

La fuĝo antaŭ la rusoj 1945

de Walter Klag



Mia patrino Anna REITER [rajter] naskiĝis 1926 en Ebersdorf, malgranda vilaĝo 50 km oriente de Graz [grac], Aŭstrio (Österreich). De 1938 ĝis 1945 Aŭstrio estis parto de Germana Regno (Deutsches Reich).

Kiam la rusa armeo alproksimiĝis en aprilo 1945, mia patrino fuĝis okcidenten, ĉar oni sciis, ke multaj germanaj virinoj estis seksperfortitaj de la rusaj soldatoj. Sube aperas la rakonto pri la fuĝo antaŭ la rusoj.

Anna edziniĝis 1948 kaj havis ekde tiam la familian nomon KLAG.

Kelkajn jarojn antaŭ sia morto 1997 Anna surbendigis siajn memorojn. Ili aperis en la formo de broŝuro en la germana lingvo kaj Esperanto.

La germanaj nomoj estas esperantigitaj.

Walter KLAG, filo de Anna, naskiĝis 1949 en Vieno.
esperanto@chello.at

La rakonto de Anna

Antaŭ nia fuĝo jam multaj homoj marŝis de oriento al okcidento tra nia vilaĝo: Virinoj kun infanoj,

maljunuloj. Al ĉiu mia patrino donis porcion da faboj. Tio estis bona ideo, ĉar la fuĝantoj tial havis ion por manĝi kaj ni mem ne povintus fortransporti ĉion.

Ankaŭ niaj soldatoj jam venis el la oriento. Nia domo estis tiam la unua en Ebersdorf. El la subtegmenta ĉambro, kie mi loĝis, oni povis bone superrigardi la tutan ebenaĵon. Tial ĉe ni oni loĝigis la stabon. Oficiro diris al mi, ke li bezonas la elrigardejon, tial mi devis transloĝiĝi en la teretaĝon.

Kelke da tagoj poste maljuna oficiro konsilis al mia patrino, ke ni foriru, ĉar la rusa armeo jam proksimis, oni jam aŭdis la pafadon. Ankaŭ mia frato Fridl estis ĉe ni. Li ne devis militservi, ĉar li havis orelan malsanon kaj nebone aŭdis. Mia patrino diris, ke ni iru al

Brajtenfeld, tie ŝi konis ŝuiston, ĉe kiu ni restu.

Poste ankaŭ SS-trupo (elita trupo) ekloĝis ĉe ni. La kamparanoj fortikigis la vilaĝon, tamen ili devis foriri. La SS-anoj diris: Kiu ne foriras, tiu estos mortpafita. Memkompreneble ĉiuj pakis la valizojn, kaj ekveturis kun ĉaro kaj bovino, kiu donis lakton. La patrino PAÜGER estis jam maljuna, ĉirkaŭ



Anna Reiter in RAD-uniform
Ĉirkaŭ 1944

70-jara, povis iri nur malgrandan distancon, mortis koratake pro la timado.

Por savi valoraĵojn ni fosis truon kaj enterigis, kio eblis, precipe librojn, fotojn, telerojn, grason, lardon kaj alion. (Kiam ni revenis ni trovis nur la pirobrandon kaj la fotojn.) Ni fortransportis, kion ni povis. Mi rajdis sur ĉevalo, mia frato Fridl akompanis min. Dum kelke da tagoj ni restis ĉe ŝuisto en Brajtenfeld. Poste ni aŭdis, ke la rusa armeo alproksimiĝas, ke ni veturu al Karintio, kiu iĝos usona aŭ angla zono. Ni devis ekveturi.

Kiam oni estas juna, tio ne estas grava afero, hodiaŭ tio estus terura, ne elpensebla. Fridl devis reiri orienten por fari kontraŭtankajn longfosojn – sensenca laboro! Antaŭe ni faris truojn en la montoj, ĉar ni pensis, ke ni povus tie kaŝi nin. Fakte tio ne okazis. La SS-anoj diris: Kiam la rusa venas, neniuj restos viva. Antaŭ Bruk (Bruck an der Mur, norde de Graz) ni lasis niajn aĵojn en vilaĝo. La homoj diris, ke ni povos ĉion repreni post la milito. Ni daŭrigis la fuĝadon. Multajn virojn kun turbanoj mi vidis kaj pro tio timis.

Verŝajne la 8an de majo 1945 ni informiĝis pri la fino de la milito. Tamen ni renkontis soldatojn, kiuj diris: Ni ne iras hejmen, ĝis vokas nin la Gvidisto! Aliaj soldatoj deŝiris la emblemojn de siaj uniformoj kaj ĵetis ilin en la riveron.

En Bruk ni marŝis laŭ la rivero Mur. Proksime estis arbareto, mi portis rajdpantalonojn, botojn kaj sunokulvitrojn. Subite venis malalte flugantaj militaviadiloj. Estis ege longa vico el soldatoj, civiluloj, infanoj kaj inoj, ĉiuj, kiuj devis fuĝi, multegaj homoj. Eble iu kriis: Protektu vin! Iu kriis: Estas jam fino de la milito kaj la fi-usonanoj mortpafas civilulojn!



Instinkte mi kuregis, faligis min en la arbareto, tie estis ankaŭ rivereto. Mi ne scias, kiel longe mi tie kuŝis. Se vi havas ŝokon, vi nenion scias. Kiam mi eliris, vi vidis, ke ĉio ... ĉevaloj, soldatoj, aliaj Ni nur klopodis foriĝi.

Post Bruk – kie ekzakte mi ne plu scias – ni renkontis soldaton nomita KRICNER, kiu havis kaleŝon. Li proponis gvidi nin al sia vilaĝo en Karintio, se ni jungas la ĉevalon antaŭ lia kaleŝo. Tion ni faris kaj kvarope ekveturis: Sinjoro KRICNER, graveda hungarino, 12jara knabino kaj mi. Tra Sankt Petro ĉe Kamersmonto ni ne veturis. Tie vivis parencoj de mi, sed mi ne konis ilin. Poste, mi pensis ĉe Muraŭ, ruso haltigis kaj traserĉis nin por trovi armilojn. En mia valizo estis nur vestoj, ni rajtis foriri. Poste la ruso denove venis al ni kaj diris, ke ni devas reiri. Mi nenion malbonan konjektis, por mi ruso estis kiel ĉiu alia homo, kaj li forprenis la selon. Rusino, kiu vidis, ke mi malsanis, donis al mi frambosukon kaj diris poste: Daváj, daváj! Tio estis mia unua rusa vorto, kiun mi aŭdis, poste mi eksciis, kion tio signifas: For! Ŝi certe sciis, kial.

La kaleŝo nur funkciis ĝis Maŭterndorf. Per la ĉevalo, kiu estis jam blinda je unu okulo, ni venis sur la montpasejon Katŝmonto kaj poste en Karintion. En Gmind, post 320-

kilometra fuĝo, ni estis ĉirkaŭ la 14an de majo 1945. La KRICNER-familianoj vidis, ke mi malsanis (mi suferis je inflamiĝo de la peritoneo) kaj diris, ke mi kaj la hungarino povas resti ĉe ili en Maltamonto kelke da tagoj. Tial mi donis al ili la ĉevalon. Sed ili ne rajtis daŭre havi ĝin. Venis la angloj, kiuj ĉion forprenis, kio estis posedaĵo de la ŝtato. La KRICNER-familianoj estis tre afablaj, donis al mi lanon, el kiu mi tajloris jakon.

Ili ankaŭ venigis kuraciston el Gmind, kiu faris tablojdojn por mi. Kiu pagis al li pro tio, mi ne scias. En 1945 eble unu helpis al la alia, sen pago. Ĉiukaze li helpis al mi, kaj mi resaniĝis. Mi ankaŭ memoras la plej junan KRICNER-filon, kiu estis ankoraŭ infano kaj ofte ludis akordionon dum mia malsano.

Du pliaj filoj de sinjoro KRICNER revenis hejmen post la milito. Unu estis maristo, la alia SS-ano, tiu devis kaŝi sin. Kun sinjoro KRICNER ni poste korespondis. Li kaj unu el liaj filoj servis post la milito kiel konstrulaboristoj ĉe la Norda Ponto en Vieno, en 1964. Ankaŭ poste ni havis kontakton kun li, ĝis li mortis. Fine de la milito ili nenion havis por manĝi, escepte de iom da malmola pano kaj lardo, kaj konjakon, tiun verŝajne tie lasis la soldatoj, ĝi troviĝis en la tero en argilaj boteloj. Tio okazis en Maltamonto ĉe Gmind en Karintio.

Al Ebersdorf mi revenis ĉirkaŭ du semajnojn poste: Unue trajne ĝis Fering, en kargovagono, sur pajlo. Dum la veturo la pordo estis fermita, tial estis malhele en la vagono. De Fering al Ebersdorf mi iris 10 km piede, dum la nokto, ĉirkaŭ la 24an de majo 1945. La saman vojon iris mia nuna edzo kvin monatojn poste, revenante el Norvegio post la militservo.

Kiam mi venis hejmen, miaj gepatroj havis nenion, nek bestojn, nek nutraĵon, nek ion ajn. Kio estis enterigita, tio estis elprenita aŭ ŝtelita, escepte de la pirobrando kaj la fotoj. Libro, teleroj, graso kaj fumajita viando estis for. En la dormoĉambro la mebloj estis parte bruligitaj. Sur la tablo,



*Ebersdorf vom Norden gesehen.
Ganz rechts das Haus Nummer 1.
Foto Walterilag Water, 1957.*

kiu havis hakdamaĝojn, la soldatoj estis buĉintaj porkon, ankaŭ sur la kudromaŝino videblis hakspuroj. La bestoj, kiujn ni ne povis venigi kun ni, estis for – escepte la katon, kiu nun havis idojn. La domo de la najbaro Karl BAÜER estis bruligita, aliaj ne. Sed tiu domo estis malbela kabanaĉo kaj pli bone rekonstruiĝis per ŝtata mono.

Miaj gepatroj, miaj fratoj Toni, Hajnc, Eriĥ kaj Sepp kaj mia fratino Elfi jam estis en Ebersdorf, kiam mi revenis. Baldaŭ venis ankaŭ Fridl, kiu konstruis fortikaĵojn oriente de Ebersdorf.

Mia frato Franc revenis nur en 1947, kun nenio. Li aspektis kiel maljunega viro. Li militservis en Norvegio kaj devis haki lignon en arbaroj. Li aspektis pli maljuna ol sia patro. Ekde tiam li neniam plu tute resaniĝis. Pro tio mia patrino transdonis al li la bienon, kvankam Fridl estis la plej maljuna. Fridl kaj Toni poste servis ĉe la fervojo.

Mi rericevis ankaŭ la vestojn, kiujn ni estis lasintaj proksime de Bruk: Mantelon, peltoĉapon, helbluan robon, dormoveston kaj aliajn. La kamparanino tie unue asertis, ke oni rabis ĉion de ŝi, sed mi vidis, ke mia

posedaĵo estis kaŝita sub klapo de tablo. Tial mi iris al la polico kaj ĉion tuj rericevis.

Poste la vivo rekomenciĝis. Ĉiusemajne unu aŭ du fojojn estis ie dancokunveno. Mi havis bonŝancon. Kun Toni, mia frato, mi ĉiam vizitis dancofestojn. Tiu postmilita tempo estis bela.

Hodiaŭ oni ne povas imagi, en kia stato tiam estis la vojoj. Piede ni

iris al Seĥaŭ en la gastejon HASENBURGER aŭ en la koktelejon MAJER, tiam jam kuniri s mia edzo Walter, mia frato Sepp, Elfi kaj ties edzo Franc. Ĉar la vojoj estis ege kotokovritaj, ni bezonis ĉiam duan ŝuparon. Ĉe la fervojtransiro estis ligna ponto, sub tiun ni deponis la malpuran ŝuparon kaj surmetis la puran, kun tiu ni iris al la dancado. Iam tiel

multe pluvis, ke la ŝuoj de Herta (edzino de Sepp) restis retenataj en koto – la sekvan tagon mia bofrato Franc serĉis ilin. Nokte oni ja vidis la vojon en la lunlumo kaj ne multe iris tra la herbejo. Estas penige, se oni ĉiam devis rigardi sur blankan vojo-strion. Ofte miaj kruroj estis malsekaj ĝisgenue.

Politiko kaj ĉiutaga vivo

de Ingegerd

La celo pridemandi politikiston estas prezenti la homon kiu nomiĝas "politikisto". "Ĉiam kulpas la politikistoj", oni ofte diras hodiaŭ.

Mi mem renkontis multajn diversajn politikistojn, kiuj havas viziojn, kiujn ili realigas surbaze de la disponeblaj rimedoj. Kion ili havas komune, de dekstre ĝis maldekstre, estas ke ili laboras "por" io kaj plejofte havas kaj scion, sperton, edukadon kaj belan sintenon.



La unua politikisto, kiun mi intervjuis en la "Arda Seĝo" numero 50 en Ora Ĵurnalo, estis Rickard Nordin, kiun mi pridemandis. Li estas parlamentano por la Centra Partio kaj pasias pri mediaj aferoj kaj faris

multon en tiu areo en la parlamento. Mi tre fidis al Rikard Nordin kiel saĝa, sperta kaj agrabla politikisto.

En ĉi tiu numero ni renkontas Tony Johansson, kiu estas politikisto de la Media Partio.

Kiel aferon de la koro en politiko, li havas sanservon kaj zorgas, ke tiuj, kiuj serĉas prizorgon, ricevu la ĝustan helpon en la ĝusta tempo. Entreprenemo estas temo kun kiu li ankaŭ laboras por antaŭenpuŝi. Devas esti laborlokoj en kaj kamparaj kaj urbaj areoj. Legu la intervjuon kaj vi komprenos, ke kulturo ankaŭ engaĝas Tony Johansson.

Fine, mi ŝatus diri, ke mi volas akcenti reprezentajn politikistojn el ĉiuj demokratiaj partioj kaj tio devas esti spegulo de la venonta elekta kampanjo.

Havu fidon je la politikisto! Laste sed ne aparte, mi ŝatus emfazi, ke la partioj estas intervjuitaj en ordo hazarda.

Iru voĉdoni kiam venos tiu tago.

En la "Arda Seĝo" demandoj al Tony Johansson

1. Kiu vi estas Tony Johansson?

Mi estas simpla homo, kiu ŝatas literaturon kaj kulturon. Pli frue en la vivo mi traktis ĉion, de esti butikasistanto ĝis esti regiona politikisto ĉe la plej alta administra nivelo. Eĉ hodiaŭ, mi laboras pri loĝado kaj konekzistado, sed en la rolo de



kunordiganto por civita oficejo. Mi preferas la apogan funkcion, ĉar ĝi donas al mi tempon por skribi librojn kune kun mia plej bona amikino Sarah.

2. Vi loĝas en Dalsland, ĉu vi povas riveli al ni iujn belajn sekretajn paradizajn lokojn por viziti ĉi-somere?

La naturrezervejo de Sörknatten norde de Snäcke-kluzo estas nepra vizito. Grandaj partoj de la filmadaptigo de Ronja Rövardotter de Tage Danielsson estis filmitaj tie, la naturo estas grandioza. Brunnsparken kun herbĝardeno kaj apoteko-muzeo en Dals Rostock, la kastelruinoj de Dalaborg sur siringa kabo en la lago Vänern kaj la artmuzeo de Dalsland en Upperud estas iuj aliaj nepraj. Tie kompreneble ni ankaŭ havas la ĉirkaŭaĵon de "Håverudsakvedukten" (la akvedukto de Håverud), sed tiun regionon estas plej bone viziti printempe, kiam la tuta "Ramslökedalen" floras.

3. Ĉu vi povas rakonti al ni pri viaj libroj?

Ĉu mi skribas por plenkreskuloj aŭ infanoj, ĉu temas pri historiaj priskriboj, ĉu pri mortaj misteroj aŭ pri pura fantazio, la vivrakontoj de homoj estas centraj en miaj libroj. Malĝojo kaj ĝojo. Espero kaj malespero. Seriozeco miksitaj kun burleska humuro. La malgrandaj proprecoj de la karakteroj flanke de la ĉefrakonto, tie kuŝas la ĉarmo en la aŭtoreco. Por ekkoni miajn kreaĵojn, por scii kiel ili agos kiam ili alfrontos la sortojn kaj aventurojn, kiujn mi ofertas al ili. Ĝi estas sento, kiu povas esti preskaŭ komparita kun enamiĝo.

4. koncerne la programon "Bokglädje" (Libra ĝojo) en Jutubo, ĉu estos novaj epizodoj ĉi-somere?

Jes jes. En iu formo ĝi revenos kun novaj, iom malsamaj kaj espereble pensigaj epizodoj.

5. Kion vi havas sur la telero, kiam vi havas la manĝaĵon plej plaĉan al vi?

Mi de infaneco ŝatas salikokojn kaj kankrojn, sed foje hejmrulitaj viandbuletoj, terpomkaĉo kaj plenplena kulero da mirteloj estas la plej bonaj.

6. Kion vi trinkas kun ĉi tiu manĝaĵo?

Citrongustan "Loka". Sana, bongusta kaj ĉiutaga luksaĵo.

7. Diru al ni ion pri via muzikaj agadoj?

Mi ludas trombonon kaj pianon por hejma bezono sed vere verŝajne temas pli por skribi melodiojn kaj verki kantotekstojn, kion mi opinias plaĉa. Foje ĝi fariĝas banala, kelkfoje ĝi fariĝas sufiĉe konvena.

8. Kiel estas vivi en Mellerud?

La avantaĝo de Mellerud estas, ke ekzistas grandega ofertado, ne laste en la natura kaj kultura areo. Ĉiujare, la municipo elspezas konsiderindan kvanton por asocia kaj kultura vivo, multe pli da monrimedoj por loĝanto ol la plej multaj gravaj urboj faras. Alia avantaĝo estas, ke estas proksima al la ofertoj de la grandegaj urboj. Al Gotenburgo necesas unu horon per trajno, al Norvegio tri kvaronhoroj per aŭto.

9. Kiel funkcias la publikaj transportoj kie vi loĝas?

Laŭ la ĉefaj vojoj, E45 kaj vojo 166, ili funkcias bone kun foriroj preskaŭ ĉiuhore. De la fervoja stacidomo oni povas atingi Gotenburgon en unu horo kaj Karlstad en 75 minutoj. Kaj kiel komplemento, ni havas lokan trafikon, kiu prenas vin ĉe la domangulo, sed vi devas rezervi la vojaĝon. Ĝi estas bona servo.

10. Se vi vojaĝus al Gotenburgo por serĉi ion vere plaĉan kaj laŭ via opinio belan celon, kien vi alvenus?

Foje mi iras al Gotenburgo nur por trinki tason da kafo en Haga kaj ĝui la homamasojn, aŭ por iri tien kaj reen kun prameto "Älvsnabben" sur la sunferdeko kun bona

libro aŭ krucvortenigmo en la mano. Unu loko kiu altiras estas "Röda Sten", kiu estas parto de la sama speco de kultura areto kiel la artmuzeo de Dalio. Mi sentas min hejme tie. La diskobutiko kun aŭtentaj viniloj en urboparto "Linné" ankaŭ estas antaŭfiksita celloko.

11. "Libraj tagoj en Dalsland"

Estas bonege, ke ni havas entute kvin tagojn ĉi-somere. Persone, mi antaŭĝojas iom ekstran renkonti Agnes Lidbeck, Zanyar Adami kaj Victor Estby. Victor Estby, kiu okazigas la librotagojn, faras heroan klopodon reklami literaturon kaj kulturon. Li estas bonega rolmodelo en la Dalia kultura grundo.

12. Kion vi pensas, se mi diras, ke la Esperanta lingvo devus esti instruata en niaj mezlernejoj?

Tio estus tute bone. Lingvo relative facile lernebla kaj kiu povas esti bona enirejo por tiuj, kiuj volas lerni eĉ pli da lingvoj.

13. Kion vi faros dum la ferio?

Mi pasigos kelkajn tagojn en Vermlando. Mi vizitus "Sandgrund" ĉe pentristo Lars Lerin, la metian centron en "Borgvik", la hantitan domon ĉe la intermontoj en Apertin kaj kompreneble "Mårbacka". Mi al kutimiĝis meti la lastan tuŝon de miaj tekstoj, la antaŭparolon, en la serena subĉiela teraso ĉe la grandbieno de Selma Lagerlöf. Inspiro kaj klarvido fluas tie.

14. Diru ion pri "Humileco"

Humileco estas montri respekton kaj esti sentema al la perspektivoj de aliaj. Ĉi tio ne signifas, ke vi devus esti cedema. Kiu montras respekton al aliaj, tiu meritas respekton.

Ingegerd Granat
intervjuis **Tony Johansson** en la "Arda Seĝo".



Centjara jubileo memore al la naskiĝo de Povel Ramel (1922–2007)



Foto el *Populär Historia*, n:o 6/2022.

Jen Wenche Myhre kaj Povel Ramel en 1970.

Povel Ramel estis amata de la tuta Svedio pro siaj ludemaj parolturnoj, inventemo kaj sia muziktalento.

En Londono li vidis kaj aŭdis la orkestron de Harry Roys – lia estonta idolo.

Li tre ŝatis ke la orkestro ne nur ludis, sed ankaŭ farsis kaj klaŭnis.

Per la melodio: "La boogie-woogie-valso de Johansson" (de 1944) li pruvis ke humuro havas lokon en la muziko.

Se vi guglas pri Povel Ramel en YOUTUBE vi povas aŭskulti liajn kanzonojn. /Siv



Esperantaj ĵetkuboj



de Inga Johansson

Ĵetkubo kun Esperantaj simboloj desegnitaj sur ĉiu edro. La punktoj esprimiĝas kiel verdaj steloj, kaj estas aranĝita la Esperanto-flago sur la edro 1. Nepre portenda por ĉiuj esperantistoj, kiuj amas tabulludojn!

Esperanta ĵetkubo:

<https://umihota.ru.booth.pm/items/3891999>



De Axel Engdahl ĝis Per Andersson

aŭ

Pri humuro oni ne ŝercu ...

Plej multaj homoj hodiaŭ konas Per Andersson pro lia kapablo furioze renversi la amuzan programon de Sveda Televido tiel ke la kompatinda prezentisto ŝiras siajn harojn. La programoj "Time Out" kaj "Parlamento" estas kelkaj ekzemploj, kiuj estas klaraj kaj plenigitaj kun la atendo de la spektantoj pri "kion la frenezulo inventos nun".

Se iu povus nun priskribi, kiu estas Per Andersson, tio verŝajne estus sufiĉe malklara informo, jes, mi efektive scivolas, ĉu tiu ĉi bonvole nekonstanta viro scias tion mem, kie li rampas – aŭ staras – en iu studioloko, kie li ne devus esti. Sed mi provas fari mallongan personan priskribon:

Per naskiĝis la 17-an de novembro 1976 kaj estas laŭ mia scio tre vivanta hodiaŭ. Li povas aperi ie ajn, en filmoj, revuoj, komunkantadoj, teatro, televidprogramoj, en la babilaĵoj de ĵurnalo GP, jes, preskaŭ ie ajn.

Li ankaŭ ricevis premiojn, i.a. la Gotenburgan Tramvojan Kulturajn Premion.



La motivigo komenciĝis per: "Ĉar li, en la plej bona elsendotempo, en ĉio, de debatoj ĝis duetoj, montris kiom reala Gotenburga buŝmovado devus soni..."

Per Andersson estas homo, kiun vi aŭ amas aŭ eble kontraŭe, ĉar estas neeble ne pensi ion pri li. Jes, mi pensas ke mi haltas ĉi tie, ĉar

”Tiel pli bone” (televida programo ”Så mycket bättre”) ĝi ne estos.

Mi anstataŭe elektas reiri al la komenco de la dudeka jarcento kiam Axel Engdahl estis la eminentulo en la samaj fakoj kiel Per Andersson.

Axel Engdahl

La Gotenburga Ernst Rolf

Axel Engdahl naskiĝis la 21-an de junio 1863 sur Landsvägsgatan 27 en la distrikto Haga en Gotenburgo. Li estis filo de fraŭla patrino, kiu penegis laboris kiel kabanpurigistino sur la vaporŝipoj.

Li komencis sian karieron kiel asekuristo kaj dediĉis sin al tio dum pli ol dudek jaroj. Krome, li laboris kiel statisto ĉe la ”Stora Teatern” kaj tie helpis pri unu afero kaj alia. En 1895 li verkis la novjaran revuon de teatro ”Storan”, ”Ankoraŭ vivas la malnovaj dioj” kaj tiel komenciĝis la teatra kariero por Axel. En 1903 li forlasis la asekurbranĉon favore al la teatro. Kune kun Albin ”Lawve” Lavén, li transprenis la teatro ”Folkteatern” en ”Lorensbergsparken”. La teatra konstruaĵo estis malgranda simpla ligna skatolo, malgranda, malvasta kaj malkonforta, sed ĉi tie Axel Engdahl sukcesis!

Monoj enen, monoj foren. Ŝuldaj valorpaperoj kaj kambioj. Pruntoj dekstren kaj maldekstren, sed estis revuo kaj komedio ĉiujare, inter tiuj li skribis babilaĵojn en gazetoj kaj ĵurnaloj. Vivo turniĝis por Axel Engdahl plenrapide.

Kune kun horloĝista amiko Håkan, oni povis vidi Axel Engdahl promeni sur la stratoj de Gotenburgo. Male al Axel, la amiko estis



malgranda en staturo kaj lia nomo estis Henning Håkansson, ili populare nomiĝis ”Davido kaj Goliato”.

”Lelle Håkan” kaj Axel okupiĝis pri neofendaj ŝercoj, kiel ŝercvokoj per telefono, la telefono kiu tiutempe estis konsiderata nova fenomeno kiu ne estis ”ĉies” propraĵo, alie oni ne farus tion. Foje funebra oficejo estis vokita, kiu estis demandita ”ĉu ili povis svepa* grogon”.

**) sveda vorto dusignifa: tombovesti/eltrinki*

Jes, li estis aktiva kaj produktiva ankaŭ kiel ordena membro en Par Bricole. De 1904 ĝis la Novjaro 1922, 37 Engdahl-revuoj kaj popolkomedioj estis enscenigitaj ĉe Folkan. *La unua estis nomita ”Sudpolusa Ekspedicio de Lunkentus Pettersson”.*

Axel Engdahl ĝuis manĝaĵon kaj trinkaĵon kaj fine akiris respektigan rondecon.

La mastro ĉe Lorensberg, kelestro Möller, ricevis promeson de Engdahl kiam ili komencis la kunlaboron, nome ke li ŝanĝos la financon de sia partnero Lavén.


Kiam Möller demandas pri la rezulto, Engdahl respondas, "Kompreneble mi sukcesis. Kiam ni renkontis, li havis SEK 5,000 en ŝuldo. Nun li havas la duoblon". Ĉi tiu respondo estis tipa de Axel Engdahl kiu estis rapida en sia respondo.

La spektantaro kaj ĉiuj aliaj ĉirkaŭ Axel Engdahl amis lin. La novjaraj revuoj kutimis esti ludataj cent fojojn kaj la popolkomedioj ankaŭ estis popularaj poste en la jaro. La vivo ŝpinis kaj Axel Engdahl malfacile rezistis la bongustaĵojn de la tablo, li ankaŭ kreskis en amplekso pli kaj pli.

La 10-an de januaro 1922, la granda revuo-reĝo de Gotenburgo mortis en la aĝo de 59. Axel Engdahl havis entombigon indan je ŝtatisto. Eĉ hodiaŭ, oni povas vidi la tomboŝtonon de li kaj lia patrino ne tiom malproksime de la impona monumento de Viktor Rydberg en "Östra kyrkogården" ĉe "Redbergsplatsen".

Eĉ hodiaŭ, li havas grandan lokon en la Gotenburga kultura heredaĵo.

La teksto sur la tomboŝtono estas malfacile legebla, sed ĝi legiĝas jene:



ENGDAHLS GRAF

MOR EMMA


* 22 6 1833

† 24 10 1916

AXEL

* 21 6 1863

† 10 1 1922



Afabla viro, kiun ĉiuj amis.

Signaloj el Marso

El "Lingvo Internacia", monata gazeto por la lingvo Esperanto, aŭgusto-septembro 1897



Signaloj de la planedo Marso

La konata angla astronomo Francis Galton havis antaŭ kelka tempo en la reĝa instituto

en Londono paroladon pri la eblo de signalfarado el malsamaj planedoj.

Li publikigas en la lasta numero de "Fortnightly Review" artikolon pri la sama

objekto kaj plejparte rilate tiujn signalojn, kiuj nuntempe estis observataj ene la planedo Marso.

Granda maltrankvileco nun regas en ĉiuj observatorioj sur nia tero – skribas sir F. Galton – pro tio, ke oni rimarkis malgrandajn ondojn da lumo, kiuj elvenis de difinita kaj limigita loko de la supraĵo de Marso, kaj tio ĉi en tiel forta kaj regula sistemo kun ĉiu tago, kaj vidiĝas difinita ordo. Ŝajnas kvazaŭ grandegaj heliografoj produktas la lumefikojn, kaj kvazaŭ la personoj manovrantaj la instrumentojn nur post iom akiris certan lertecon je tiu signalado.

Unu el la grandaj eŭropaj observatorioj konstruigis registran aparaton por noti tiujn

ĉi signalojn el Marso. Horloĝa maŝino transtiras malrapide paperan strion sub alpendigita krajonpinto, kiun la observanto, ĉe ĉiu lumfulmo el Marso premas sur la paperon lasante ĝin tie resti dum la daŭro, ĝis la signala flamo estingiĝis.

Tiamaniere oni jam prosperis difini la specon da lumado de la signalo, kaj per tio vidiĝis, ke estas tri difinitaj fajroliteroj. La unua daŭras dum $1\frac{1}{4}$ sekundo, la dua dum $2\frac{1}{2}$ sekundoj kaj la tria dum 5 sekundoj (punkto, streko kaj strekego).

Sir Francis Galton tiras el ĉio ĉi la konkludon, ke Marsanoj volas interparoli kun ni.

El "Aftonbladet" 19-1-1897. Trad, P. N-n.

Universo

de Roger Nilsson

Kiom da jaroj havas via aŭto? Ĉu vi pensas, ke via aŭto estas amaso da rizo? Ĝi fakte aĝas 13,8 miliardojn da jaroj. La plej bona maniero por ekscii el kio estas farita aŭto estas efektive malmunti ĝin. Fero, oleo, plasto kaj kaŭĉuko estas forigitaj unue. Poste aluminio, silicio, kupro kaj valormetaloj kiel plateno kaj oro. Ĉiu materialo estas absolute kerna por konstrui aŭton. Sed en la frua universo ili ne ekzistis.



Antaŭ 13,8 miliardoj da jaroj, la universo estis kreita en grandioza evento. La praeksplodo.

En la komenco, la universo konsistis nur el energio. Post la Praeksplodo, ĝi estis nur kaosa amaso da aĵoj, nenio el tio, kion vi vidas hodiaŭ. Kiam la universo malvarmiĝis, okazis materio kaj antimaterio, poste venis protonoj kaj neŭtronoj kaj fine atomoj. Sed ne silicio, fero aŭ karbo, kiujn ni uzas por fari aŭtojn hodiaŭ.

La universo preskaŭ konsistis tute el hidrogeno. Io devis okazi por ke ni ricevu la alian kaj ĉio estas fakte farita el konstrubriketoj de hidrogeno.

Hidrogenatomo estas la plej simpla kaj malpeza substanco en la universo, ununura pozitive ŝargita protono ligita al ununura negative ŝargita elektrono. La universo konstruis pli grandajn atomojn kiel karbono kaj fero kunigante hidrogenajn atomojn. Ĉio

komenciĝas per pli simpla fonto. Fero estas multaj simplaj feratomoj kunmetitaj.

Sed hidrogenatomoj ne kuniĝas nature. La protonoj estas pozitive ŝargitaj kaj kiam ili alproksimiĝas unu la alian ili malfruigas unu la alian. Ili ne volas pendii. La disvastigo igas la universon maelstromo de hidrogenaj atomoj kiuj turniĝas por eviti unu la alian, sed se vi povas kunpuŝi ilin vere, ili blokiĝos unu en la alian. Kunfandi atomojn tiel forte ke ili kunfandas nomiĝas fuzio.

Per fuzio, la universo estas transformita en universon de planedoj kaj vivantaj estaĵoj. Ĉiuj elementoj estas kunigitaj per protonoj en la atomkerno kaj tiom da elektronoj kiuj turniĝas ĉirkaŭe kiom faras la planedoj ĉirkaŭ la sunon. La nombro da protonoj en la nukleo determinas kiu substanco ĝi estas. Estas 92 naturaj elementoj, krome, ili artefarite kreis ĉirkaŭ 10 aliajn elementojn, sed ili povas travivi nur frakcion de sekundo. Elemento 1 estas hidrogeno kaj elemento 92 estas uranio, do ili havas 1 kaj 92 protonojn en la kerno kaj tiom da elektronoj kiuj turniĝas ĉirkaŭe kun sovaĝa rapideco. Krom protonoj

en la atomkerno, ekzistas ankaŭ neŭtronoj. Foje elemento povas havi malsamajn nombrojn da neŭtronoj, ekz. ekzistas varianto de hidrogeno kiu havas neŭtronon kaj ĉi tiu varianto nomiĝas deŭterio kaj alia varianto kun du neŭtronoj nomiĝas tritio.

Hidrogeno kaj heliumo estis kreitaj ĉe la naskiĝo de la universo. Pli pezaj substancoj kun ĝis 26 protonoj (fero) estas kreitaj en steloj. Substancoj kun pli da protonoj, ekz. arĝento kaj oro estas kreitaj en supernovaj eksplodoj, kiuj okazas kiam steloj kiuj estas multaj fojojn pli grandaj ol la suno eksplodas. La elementoj povas esti kombinitaj en malsamaj kombinaĵoj, en tiel nomataj molekuloj. Akvo ekz. konsistas el du hidrogenatomoj kaj unu oksigenatomo, komuna salo de unu natrio kaj unu kloroatomo, dum ordinara sukero konsistas el granda molekulo kun 12 karbonatomoj, 22 hidrogenatomoj kaj 11 oksigenatomoj.

Do, vi estas kompleksa estaĵo kreita de substancoj, kies origino estis farita el stelpolvo.

Universo, kiu vi estas? – Universum, vem är du?

de Siv



Tiuj, kiel mi povis aŭskulti prelegon, aranĝita de "Stiftelsen Kosmos, Varnhem", vere ĝuis renversan vivkoncepton. Temis pri du kontraŭaj ideoj pri la origino de malsanoj.

La titolo: *"Terrängteori versus bakterieteori i kosmisk belysning"* ("Terenoteorio kontraŭ bakteria teorio sub kosma lumo").

Stiftelsen Kosmos-Varnhem 2022
www.nykultur.nu

Föreläsning
Terrängteori vs bakterieteori i kosmisk belysning
Rune Östenson

Vår nuvarande vetenskapliga syn på sjukdomar och speciellt infektionssjukdomar är att det är något som angriper oss utifrån – sjukdomsframkallande mikroorganismer. Och därför det stora intresset för vaccinationer. Men finns det en annan väg att gå? Vi samtalar om detta viktiga ämne.

Plats: Norra Allégatan 6 (Folkuniversitetet), nära Järntorget, Göteborg, våning 4.
Dag och tid: Lördag, 30 april, kl. 13.00.
Inträde: 100 kr (pensionärer, studenter, arbetslösa 60 kr)
Fika: 30 kr (vegansk och ekologisk)

Välkommen!

I samarbete med NBV

Rune Östensson naskiĝis 1951 kaj laboris dum 30 jaroj kiel mikrobiologo pri esplorado kaj evoluo.

Ekde 1981 li prelegis kaj gvidis kursojn pri Martinus Kosmologi en Skandinavio.

Mi ne povas redoni lian inspiran kaj penseman prelegon, sed mi aĉetis lian libron *Kosmo*, kiu vi estas?

En "Universo, kiu vi estas" naturscienco kaj



vivscienco renkontiĝas. La naturscienco havas la fizikan materion kiel la ĉefan objekton por esplorado. La vivscienco de Martinus havas la konscion kaj la mema vivo en la fokuso. En ĉi ti renkonto oni povas vidi la grandajn aferojn de la vivo en nova lumo.

- La naskiĝo kaj evoluo de universo
- La origino de la vivo
- La materio kiel lumo
- Kio estas konscio?
- Kio estas la senco de vivo?

Bonvenon al streĉa vojaĝo, de makrokosmo al mikrokosmo – tra la vivanta malpleno de la kosmo kaj la brilantaj sunoj en nia ena universo! /Siv



Afrika poligloto

Espoir Kasati parolas plurajn lingvojn kaj tial li rajtas nomi sin "poligloto". La plejparto estas afrikaj lingvoj kiel ekzemple la svahilan. Li diras: – "Mi regas jenajn afrikajn lingvojn: Fuliran lingvon (kifuliru: mia patrino), Kibembe, Kiviran, Svahilan, iom da lingala lingvo". La francan kaj la anglan li bone regas – kaj kompreneble Esperanton, lingvon pri kiu li ofertas kursojn.

Gratulojn Espoir, diras Siv kaj la gotenburĝanaj esperantistoj!



Esplor Kasati ofertas esperantokurson:

”Al Svahillingvaj afrikaj Esperantistoj, mi sciigas al vi, ke restas iom da tagoj por fermi la aliĝeblojn al la Esperanta kurso por

svahillingvanoj kaj (franclingvaj). Hastu informi viajn kunloĝantojn, ke jam estas okazo aliĝi antaŭ dimanĉo...

Ili kontaktu min vacape: +243 972 716 042”

Konsilo por pli sana vivo

Roger Nilsson trovis ĉi tiun artikolon interrete:

Se vi profunde enspiras, la tutan vojon malsupren de la diafragmo, vi sentos vian stomakon elstari. Kiam vi poste malstreĉiĝas en la diafragmo kaj brusto, la aero estas malrapide liberigita el la korpo per si mem.

Jen kiel vi devus spiri, sed kvankam nia spirado evoluis dum milionoj da jaroj kaj vere devus esti tute natura, la plimulto el ni spiras malĝuste. La pulmoj, koro kaj cerbo konstante adaptiĝas unu al la alia.

Novaj esploroj montras, ke la organoj estas perfekte sinkronigitaj, kiam **ni spiras ekzakte po ses fojoj por minuto**, kio estas proksimume duono pli rapide ol la plimulto el ni spiras. La avantaĝoj de pli malalta spira rapideco estas signifaj. Studoj montris ke reduktita spira ritmo kondukas ke korritmo estas tuŝita tiel, ke ambaŭ malhelpas mensajn malordojn kaj plilongigas la vivon.

Alivorte alta korfrekvenca variado ludas gravan rolon por fizika kaj mensa bonstato – kaj la ŝlosilo de ĉi tiuj utilaj efikoj en ni estas la diafragmo.


Tio sonas preskaŭ tro bone por esti vera, sed la mesaĝo de la esploristoj estas klara: Ne necesas pli ol kelkaj profundaj spiroj por ke ni vivu pli longan vivon kaj estu pli trankvilaj.




Kiel servi fruktojn kaj legomojn?

de Josef Kříž, panglotia@gmail.com

Josef havas multajn videojn, kiuj estas tre amuzaj ekzemple pri diversaj modoj servi fruktojn.





Kanti en koruso

En la paroĥhejmo de Stora Lundby en Gråbo pendas foto pri majesta koruso. Belaj ruĝaj manteloj portas ĉi tiuj – certe bele kantantaj membroj el pasinta epoko.

Mi ŝatas kanti kaj estis logita provi en senjora koruso de Stora Lundby. Ĝi estas sufiĉe nova kaj havis nur manplendon da partoprenantoj. Do ne eblis kaŝi sin en la homamaso. Alia nova membro alvenis. Ni ambaŭ diskutis pri la avantaĝoj de



malgranda koruso: Ni rapide ekkonas unu la alian kaj ni povas influi la kanto-elekton. La aliaj partoprenantoj havas multjaran sperton de pli granda koruso, sed ne perdis



sian entuziasmon por kantado.

Ankaŭ nia gvidanto, kantoro Hanna Engström, estas entuziasma. Dum la printempo, ŝi logis nin fari du prezentadojn. La 21an de aprilo ni partoprenis en "Kafo dumvoje" en la paroĥa hejmo. Hanna estis

kunmetinta "muzikalon", kie troviĝas kantoj el "Sound of Music" ("Sono de muziko").

Inter ĉiu kanto, ŝi rakontis pri la fono de la muzikalo, ne nur pri la imaginitaj eventoj, sed ankaŭ pri kio okazis en la reala dramo. Kompreneble ni ankaŭ vidis la filmon por vere "vivi la rakonton".

La dua prezento okazis en Stora Lundby-preĝejo, dimanĉon 12 majo.

Ĝojplenaj someraj himnoj kiel "La tuta mondo nun ĝojas" kaj "La tempo de amo" estis inkluzivitaj, kaj ankaŭ "Patro nia", unu el miaj plej ŝatataj melodioj.

Tiufoje ni havis la ruĝajn mantelojn. Vere solene!



La sekvantan semajnon estis tempo por la fino de la semestro kun muzika kvizo kaj rabarba kuko.

Koran dankon al vi Hanna pro ĉiuj amuzaj momentoj! Ĝis revido ĉi-aŭtune!

Mi fotis kaj skribis – origine svede – por la Paroĥa Folio de Gråbo. Mi akceptis skribi, kondiĉe ke ili ankaŭ legu ĝin en Ora Ĵurnalo.
☺/Siv

Wasa-lauf – kio ĝi estas?

Svedoj ja ŝatas ke eksterlandanoj interesiĝas pri Svedio. Ĉu niavice ni interesiĝas pri kio okazas en aliaj landoj? Almenaŭ Ora Ĵurnalo faras tion kaj ankaŭ miras pri la intereso pri la sveda lingvo.

Jen kelkaj demandoj de Walter Klag, Aŭstrio. Vi ja baldaŭ konos lin ĉar li de tempo al tempo sendas artikolojn al Ora Ĵurnalo.

Kiel oni diras Wasalauf en la sveda?

Se mi ĝuste legas kaj tradukas:

"I fäders spår – för framtids segrar" = En la spuro de la patroj – por la venkoj en la estonteco.

Ĉu vere?

Salutas Walter

Schweden 2022 Harenberg

Mai 21 Woche ☀ 21.5–20.6

23	24	25	26	27	28	29
Montag	Dienstag	Mittwoch	Donnerstag Christi Himmelfahrt	Freitag	Samstag	Sonntag

Ziel des Wasalaufes in Mora, Dalarna

Torbjörn Skogedal

Walter Klag sendis la bildon.

Respondo: Vasaloppet (elparolo: vasa lopet). Via traduko de "I fäders spår..." estas bona! "Lopp" (Vasaloppet) devenas de "löpa" = kuri. La Vasa kurado. Temas pri ski-kuro.

Vasaloppet komenciĝis en 1922 kaj ekde tiu jaro ĝi okazas ĉiun jaron en la unua dimanĉo de marto por honori Gustav Vasa, (1496–1560), kiu "savis nian landon de la danaj soldatoj."

La dana reĝo Kristian II invadis partojn de Svedio, kiu fakte ne je tiu tempo estis unuigita lando. Gustav Eriksson, el la gento Vasa, dum kelka tempo estis prenita kiel ostaĝo al Danio kaj venenigita. Li fuĝis al Lübeck kaj poste revenis al Svedio. Lia patro kaj kelkaj parencoj estis murditaj de la kruela Kristian. Ŝajnas ke ĉiuj reĝoj estis kruelaj je tiu tempo.

La viroj en Dalekarlio estis konataj pro sia rezisto al potenculoj. Ili sciis, ke rezisto valoras.

Danaj soldatoj serĉis Gustavon kiam li estis survoje al Norvegio. Du svedaj skiantoj ankaŭ serĉis lin por farigi lin estro de la restaĵo. En

Sälen (nuntempe vintra montega skicentro) ili atingis lin kaj igis lin reiri al Mora, kiu estas loka centro, ĉirkaŭ 90 km de Sälen. Gustav antaŭe provis persvadi la dalekarlianojn, kiuj havis armilojn, iri al Stokholmo kaj forpeli la danojn, sed sen sukceso. Kiam li revenis al Mora la novaĵoj de "la sangobano de Stokholmo", farita de Kristian II, atingis Mora. Tiam la viroj pretiĝis defendi Svedion. Ili ariĝis por marŝi al Stokholmo. Dum la marŝo aliaj kuniĝis kaj per la farmista armeo la danoj finfine estis forpelitaj.

La nobelecaj viroj certe ne skiis je tiu tempo. Tamen la fabeloj pri Gustav Vasa diras ke li skiis. Ĉiuokaze miloj da skiantoj el pluraj landoj venas ĉiun jaron la duan dimanĉon de marto por skii la saman vojon kiel Gustav "skiis".

En 1523 Gustav Eriksson Vasa fariĝis la reĝo de Svedio. Li unuigis la landon, enkondukis la protestantismojn kaj fondis la Vasadinastion.

Eĉ nia nuna reĝo Carl XVI Gustaf skiis Vasaloppet kiam li estis juna. Kun laŭdo! /Siv

Dum la tago de la malsupreniro de Sankta Spirito

El nia serio de noveloj de Aira Kankkunen

La semajno estis eksterordinare longa. Ni atendis – mi kaj mia fratino, unu jaron pli juna ol mi – la venontan dimanĉon. En la vestoŝranko pendis niaj novaj somerrobaj, ĉielbluaj kun maldikaj malhelbluaj preskaŭ nigraj mallongaj ondoformaj strioj. Ili jam estis pretaj tutan semajnon, kudritaj de nia patrino. Ni nin vestis en ili nur por surprovadoj dum la kudrado. Multfoje dum la semajno ni iris al la ŝranko, singarde malfermis la pordon kaj – unue ni nur distance miris iliajn belecojn, poste ni ankaŭ tuŝetis la molan ŝtofon.



La tutnovaj vestoj ne estis ĉiutagaj aferoj por ni, la plej junaj infanoj, en nia familio; tamen novajn robojn ni havis, sed kutime ili estis rekudritaj el jam uzitaj vestoj de niaj malpli junaj fratinoj.

Nia patrino estis vere lerta por renovigi jam uzitajn vestojn. Ŝi uzis la plej bonajn ŝtofopecojn, lavis kaj tinkturis ilin, kaj – la ŝtofopecoj estis kiel novaj. Pro tio ni estis ne nur bon- sed ankaŭ belvestitaj, eĉ ĝis tiugrade, ke vilaĝanaj infanoj supozis, ke nia familio estas riĉa, ne nur pensante pri la nombro de infanoj (ni havis dek infanojn),

sed ankaŭ monmaniere. Sed honoro de la belvestoj apartenis al nia patrino.

Sed nun la novaj roboj estis kudritaj el tutnova ŝtofo. Nia patroflanka onklino sendis al ni la ŝtofon, kaj ni ricevis, ne nur tiun ŝtofon, sed samfoje ankaŭ la alia patroflanka onklino sendis al ni roboŝtofon. Tiu ŝtofo estis ruĝa kun blankaj nedifinitaj figuroj. Ankaŭ el tiu ŝtofo la patrino kudris robojn, sed ili estis preskaŭ ĉiutagaj vestoj. La bluaj roboj havis bonan kvaliton, la ŝtofo estis iom dika sed tamen malpeza kiel bona silko. Do – ili estis veraj festoroboj.

Ni atendis feston, la tagon de la malsupreniro de Sankta Spirito, okazanta ĉe la komenco de junio. Kvankam ni loĝis en la norda parto de Finnlando, tamen la vetero estis varma kiel somere. Oni povis promeni nur robovestita ekstere. La patrino proponis, ke ni vestu nin en la novaj roboj dimanĉe, ne antaŭvespere, ĉar eblis, ke dimanĉe ili ne plu estos puraj.

Dimanĉoj en nia hejmo estis kvietaj: troviĝis reguloj. Ni havis radioricevilon, maloftaĵon en nia vilaĝo. Pro tio kelkaj vilaĝanoj venis dimanĉe en nian hejmon por aŭskulti radiodiservon. Post la diservo nia patrino donis al la geaŭskultintoj kaj al nia propra familio "kirkko-kafon", (oni nomis tiel la kafotrinkadon post diservo, kirkko = preĝejo). Mi ne scias, ĉu vilaĝanoj vere venis por aŭskulti la diservon aŭ eble ili venis pro la kirkkokafo.

Ni, la plej junaj infanoj, ne devis ĉeesti tutan tempon (preskaŭ du horojn) en la diserva ĉambro. Ni rajtis eliri kaj ludi en la aliaj ĉambroj, sed ni devis esti kvietaj. Se ni ludis surkorte, ankaŭ tie la ludoj devis esti mallaŭtaj. Pro tio dimanĉmatenoj estis treege longaj kaj enuigaj, sed tamen tiu komuna

kvieteco donis ankaŭ al ni, etulinoj, senton pri familia interharmonio.

Finfine venis la atendita dimanĉo. Post la matenmanĝo ni vestis nin en la novaj roboj. Ni volis tuj iri al nia plej proksima najbaro por montri niajn robojn, sed – ne eblis – estis ja dimanĉo. Neniu vizito antaŭ diservo! Ni kunestis momenton ĉe la diservo, sed poste ni promenis surkorte. Pro la falorisko ni ne kuris, ĉar se ni falus, la roboj malpuriĝus. Ni ne rajtis promeni surlandvoje – estis ja dimanĉo! Kia longega tago! Estis multe da tempo por cerbumi pri la malsupreniro de Sankta Spirito, pri kiu la pastro parolis. La okazaĵo ne estis novaĵo por ni, ĉar en nia hejmo ankaŭ la infanoj konis la enhavojn de la religiaj festotagoj. Oni ne aparte instruis pri ili, sed ni ja vivis en atmosfero, kie religiaj aferoj ĉirkaŭis nin, kaj iom post iom ni proprigis al ni la signifojn per "naturmetodo".



Mämmi.

La festo de Sankta Spirito estis gaja; pasinta estis nun la peza Sankta Vendredo, kiam – laŭ mia memoro – plejofte veteroj estis malbonaj, tagoj malhelaj, eĉ pluis kaj ŝtormis. Ankaŭ la homoj aspektis malgajaj. Ĉie ekzistis nur nigreco. Feliĉe venis pasko kaj kune kun ĝi ĝojosento, kaj tiam ni manĝis "mämmi"-n (speciala finna dolĉgriaĵo, por

pasko farita) kaj koloritajn ovojn. Post la pasko estis longa tempo sen malĝojaj religiaj festoj kaj printempe venis Sankta Spirito, kiu havis kune kun si multajn blankajn kolombojn, kiuj ĉirkaŭflugis tra la ĉielo, eĉ se ni – nuntempe – ne vidis ilin, sed en multaj libroj troviĝis bildoj pri tio; pro tio la okazaĵo devis esti vera. La festo enhavis mirindan misteron, tute ne kompreneblan, sed troviĝis ja multaj religioligitaj aferoj, kiuj ne estis kompreneblaj. Kiam la kolomboj dum la unua festo de Sankta Spirito ĉirkaŭflugis super homamaso, tiam ĉiuj ekkomprenis unu la alian. Certe la kolomboj donis al homoj tiun

povoscion. Mi malĝojis, ke post la festado homoj forgesis la kolombolingvon, aŭ eble la kolomboj devis forporti ĝin kaj redoni sian lingvon al Sankta Spirito, ĉar li ja regis la lingvajn aferojn. Devis esti la sama Spirito, kiu iam ankaŭ longe miksis la komunan lingvon de la homoj... Eble ĝi estis la sama kolombolingvo. Troviĝis bildoj ankaŭ pri tiu okazaĵo. La homoj estis konstruantaj grandegan komunan domon, kiu jam etendiĝis preskaŭ ĝis la ĉielo, kiam – ho ve! Sankta Spirito malaltiĝis sur la konstruaĵon kaj ruinigis ĝin. Krome li miksis la komunan lingvon tiamaniere, ke la homoj ne plu komprenis unuj la aliajn. Ekzistis neniu kolomboj, nur la mano kun la terura glavo kaj timegaj homoj. Certe la kompatindaj kolomboj sidis en siaj kaĝoj. Eble ili ploris. Nur unufoje jare ili havis rajton flugi nevideblaj, ĉar estas la festotago, sed ili ne rajtas redoni sian lingvon al la homoj. Ni konkludis, ke la tago de la malsupreniro de Sankta Spirito kune kun la kolomboj devas esti nur memorfesto. Tamen ŝajnis al ni, ke la plenaĝuloj atendas, ke la kolomboj revenu kaj donu al la homoj sian lingvon.

Finiĝis la diservo kaj la kafotrinkado. Tuj post tio ni kuris al nia najbaro. Tiutempe la dompordoj ne estis ŝlositaj, oni povis simple eniri sen frapi la pordon, diri sian "Bonan tagon!" Ofte nur "Tagon!" kaj sidiĝi sur la benko. En nia najbardometo troviĝis du longaj benkoj najlofiksitaj en la sidĉambromuroj. Kiam envenis vizitanto, li tuj sidiĝis sur la benkfino ĉe la pordo, kaj viroj metis sian ĉapelon sur la benkon. Do – ankaŭ ni faris sammaniere, riverencis, diris: "Tagon" kaj sidiĝis sur la benko. Tuj venis al ni la mastrino, eta iom kurba maljunulino aplaŭdante kaj mirante niajn novajn robojn:



La preĝejo en Vuolijoki.

– Ion similan mi neniam vidis, neniam vidis!
Ion similan mi neniam vidis, neniam vidis!

Ŝi tuŝetis la robojn, levis la juprandojn
singarde per siaj ambaŭ manoj.

– Ion similan mi neniam vidis, neniam vidis, ŝi
daŭrigis sian miradon.

Ĝuste tion ni atendis. Ni ja havis plifruajn
spertojn kaj pro tio, ni volis montri al ŝi niajn
festorobojn. Neniu alia povis sammaniere
kontentigi nian fierecon.

Ni rakontis al ŝi, ke nia patrino kudris la
robojn el la ŝtofo, kiun sendis al ni nia
patroflanka onklino. La mastrino sidiĝis ĉe ni
kaj daŭrigis sian laŭdadon. Certe tiu vizito
donis al ŝi varion meze de ŝiaj vere simplaj,
ĉiutagaj rutinoj. Ŝi havis nin kiel gastojn kaj ŝi
donis al ni sukerkukon, tre flavan, kiun ŝi
deponis en malvarma ĉambretforno. Somere
la ŝtona forno estis bona loko por bakaĵoj, ĉar
la dikaj ŝtonoj estis malvarmaj. Ŝi volis doni al
ni ankaŭ kafon, sed ni ne volis trinki ĝin, ĉar ŝi
metis salon en la kafon. Ni diris, ke ni ne

kutimas trinki kafon kaj parte
tio ja estis vera, do – ni manĝis
ŝian flavan bongustan kukon.

Nia vizito vere estis eta festo
por ŝi, ĉar ankaŭ ŝi volis montri
al ni siajn trezorojn. Ni eniris en
la tre malgrandan
dormoĉambron. Troviĝis tie nur
unu lito, du seĝoj kaj komodo
kun kvar kestoj. En la plej supra
kesto ŝi havis siajn plej valorajn

vestojn i.a. kaptukojn. Tiujn tukojn ŝi montris
al ni. Laŭ ŝi la plej valora estis la granda
silkkaptuko kun longaj franĝoj. Ĝi estis la
amesprima donaco de ŝia edzo. Ĝi estis la
preĝeja kaptuko, nigra. Neniam mi vidis
samnigran ŝtofon. La nigreco havis misteron
timigan, sed tion mi ne diris al ŝi, ĉar –
kvankam mi estis infano, mi bonkomprenis la
respekton, per kiu ŝiaj fingroj tuŝetis la
silkteksaĵon. En mia memoro, ekde mia frua

infaneco, nigreco estis kunligita al vere malbonaj okazaĵoj, antaŭ ĉio al la morto, pri kiu nia avino ofte memorigis kaj terure priskribis al ni la inferon. La preĝeja kaptuko de nia najbarino kun sia profundnigra koloro estis por mi simbolo de la plej, plej nigra timo kaj mi memoris la diron de mia avino:
– *Venos la tempo, kiam ankaŭ en nian hejmon oni portos la nigran ĉerkon.*

Ni sciis, ke en tiun ĉerkon ŝi metis nian patron, kiun ŝi ne ŝatis, ĉar li ne apartenis al ŝia religia sekto.

Ni ne restis longan tempon ĉe nia najbarino, ĉar ni ja volis rakonti hejme pri tio, kio okazis ĉe ŝi. Sed mi ne rakontis pri la nigra timo. Mi kaŝis ĝin en la profundeco inter miaj memoraĵoj.

✻

Tutan tagon ni iradis hejme kiel princinoj, ludis singarde, por ke ni ne malpurigu la vestojn. Certe laŭ niaj gepatroj kaj gefratoj ni

estis eĉ foje modelaj infanoj, ĉar ili ja ne bezonis postkuri nin por scii, kie ni estas aŭ kiun nepermesitan aferon ni nun elpensis.

Venis la tempo por tagmanĝo. Tiam la patrino proponis, ke ni transvestu nin. Oni ja neniam sciis, kio povus okazi ĉe la manĝotablo, kiam dekdu personoj manĝas. Ni tute ne protestis. Kvankam estis vere mirinda sperto iradi vestita kiel princino, oni ja ne povas vivi tutan tagon gardante sian robon. Do – ni vestis nin en ĉiutagaj vestoj kaj sentis nin kontentaj.

Post la tagmanĝo ni malaperis. Iu el niaj fratinoj trovis nin en gruzofosaĵo je la distanco de preskaŭ unu kilometro de nia hejmo. Tiu loko estis nepermesita, ĉar troviĝis risko por gruzdeglitego. Tie ni sidis surgruze kaj konstruis fortikaĵojn el gruzo kaj ŝtonoj. Ni jam forgesis la tagon de la malsupreniro de Sankta Spirito. La kolomboj restis en siaj kaĝoj ĝis la venonta festado. La novaj roboj pendis en la ŝranko. Ree la vivo estis ordinara.

Agendo de la sekvaj eventoj en franca Esperanto-kastelo Greziljono

- 2022-jul-02/03 2-a Festivalo FestiNATUR' (kun Esperanto-kurso)
- 2022-jul-04/08 3-a Verda Naturisma Semajno kun INOE
- 2022-jul-11/21 6-a Maratona Esperanto-kurso kun Paweł Fischer-Kotowski, Alex Humet, Andrea Bertrand ... FEI-ekzameno
- 2022-jul-11/21 34-a Internacia E-Konferenco pri variaj temoj
- 2022-jul-25/aŭg-04 8-a Interŝanĝoj de scioj k faroj (franclingve)
- 2022-aŭg-16/25 12-a Festa Semajno por infanoj kaj familioj kun Jean-Luc, Nicky, Larisa, Bert...



- 2022-okt-14/16 Staĝo de dancoj bulgaraj, rumanaj kaj hungaraj kun Célia Kameneff, Philippe Colleu
- 2022-okt-17/24 BEMI-Semajno de biciklistoj kun Olivier Buisson
- 2022-okt-18/23 Ĥora renkonto 'Interkant' kun Zdravka Bojĉeva

- 2022-okt-21/23 15-a post-Somera Universitato de EDE
- 2022-okt-24 / nov-03 11a AŬTUNE, la Esperanto-ferioj, kursoj kun Anna Löwenstein kaj aliaj

**BONVENON EN VIA
ESPERANTO-KASTELO!**

NB: Aliĝi 2 monatojn antaŭe por profiti rabaton /*Berto Ŝuman*

Kulturdomo de Esperanto
Kastelo Greziljono
1310 Route du Lude, Grésillon
FR-49150 BAUGÉ-EN-ANJOU
+33-2.41.89.10.34

kastelo@gresillon.org

Esperanta semajno en Klint, Danio el "Informo" (esperanta membrogazeto de Ĉeĥio)

Kunveno en Danlando

Inter la sabatoj la 30-a de julio kaj 6-a de aŭgusto 2022 la Esperanto-semajno en Klint okazos paralele kun dana, sveda, angla kaj germana kursoj en internacia etoso.



Matene estos lingva instruado pri la internacia lingvo Esperanto, posttagmeze estos konversacia rondo.

En vespero estos interpretata prelego aŭ distra programo, estos ankaŭ teo kaj kukoj en la restoracio Terrassen. Bonvenon al la Martinus-Centro, Klint.

Skribu al info@martinus.dk Ole Therkelsen

El la nova numero de eo-Kosmos. Revuo de Martinus-Instituto, Danio

Interrete pri la Centro de Martinus:

Martinus Centro situas ĉe la Kategato en pitoreska kaj paca areo fare de la malgranda komunumo Klint okcidente de Nykøbing Shelland.

La centro estas samtempe paca oazo por spiritaj serĉantoj, kiuj interesiĝas pri studado de spiritscienco surbaze de analizoj de Martinus.

Vi ankaŭ povus gugli por ekscii pli pri Martinus Kosmologio aŭ Martinus centroj de Klint, Varnhem aŭ Stokholmo. /Siv



Martinus Centro.

Societo de Esperanto Amikoj "TORENTO" elkore invitas al la jubilea
10-a aranĝo:

Esperanto sur la strando

8–11 Septembro 2022

- solenan festadon de nia jubileo
- promenado en urbo kun specjala gvidtemo: "Spuroj de scienculoj en Gdańsk"
- vizito en la Gdanska Politekniko

Kondiĉoj:

kotizoj de partopreno: 60 zł,
tranokoj en la Studenta Domo numero 5
(Gdańsk, str. Wyspiańskiego) 57,5 zł /nokto.

Kiel aliĝi: skribu al torentosopot@wp.pl

Pli da informoj:

<https://www.facebook.com/ESPERANTO.TROJMIASTO>



Aĉetu la Centran Oficejon (el Libera Folio)

Torben Svendsen sendis la informon de
Redakcio je 2022-06-08 en movado, UEA.

La domo en kiu ekde 1962 troviĝas la Centra
Oficejo de Universala Esperanto-Asocio nun
estas vendata. La domo estas proponata al

aĉetantoj en la retejo de nederlanda
maklerista firmao por la prezo de 1,8 milionoj
da eŭroj. La merkata valoro de la domo laŭ
pli frua takso estas ĉirkaŭ unu miliono da
eŭroj.

Steun Oekraïne Doneer aan Giro 555

funda in business Inloggen

Home > Rotterdam > Oude Westen > Nieuwe Binnenweg 176

Foto's 29 Plattegrond 5 360° foto's 5 Video Alle media

Nieuwe Binnenweg 176
3015 BJ Rotterdam
€ 1.800.000 k.k.

Omschrijving
Algemeen
Beschikbaar voor verkoop is een volledig pand op een perceel eigen grond van 372 m² met een totaal volume van ca. 520 m³ verdeeld over 4 bouwlagen.

Ooms Makelaars
Bedrijfshuisvesting B.V.
Telefonisch bereikbaar tot 17:30
Toon telefoonnummer

<https://www.liberafolio.org/2022/06/08/acetu-la-centran-oficejon/>

Sommarpoesi



En önskan

Av hela vår soliga värld
önskar jag blott en trädgårdssoffa
där en katt solar sig ...
Där skulle jag sitta
med ett brev i barmen,
ett enda litet brev.
Så ser min dröm ut ...

av Edith Södergran

Deziro

De nia tuta suna mondo
Mi nur volas ĝardenan sofon
kie kato sunbanas...
Tie mi sidus
kun letero ĉe la brusto,
ununura malgranda letero.
Jen kiel aspektas mia songo...

de Edith Södergran

En Esperanton: Ingegerd Granat



Maskrosen

Det står en liten maskrospilt
bland andra maskrosgossar
i åkern där den vuxit vilt
och blommar så den blossar
Den slagit ut sitt gula hår
och sina gröna fjäll.
För knoppen som sprack ut i går
blev blomma nu i kväll.
Nu står den stark och stolt och svälld
där i sitt maskrosland
och sträcker morsk sin lilla eld
mot solens heta brand.
Den skjuter upp så glad och stor,
men nedanför den står
en klen och sorgsen äldre bror
och fäller vita hår.
Så gäller för vart maskrosfrö
en ordning ingen rubbar:
Först blir de eld, så blir de snö,
och sedan gamla gubbar.

Av Inger Hagerup

La leontodo

Staras eta leontodo
inter aliaj leontodoknaboj
sur la kampo estis ĝi sovaĝa
kaj floras tiel ke ĝi ekflamas
Ĝi etendis siajn flavajn harojn
kaj siajn verdajn skvamojn.
Ĉar la burĝono, kiu krevis hieraŭ
fariĝis floro ĉi-vespere.
Nun ĝi staras forta kaj fiera kaj ŝvelinta
tie en sia leontodobedo
kaj brave etendas sian fajreton
kontraŭ la varma fajro de la suno.
Ĝi ekkreskas tiel feliĉa kaj granda,
sed malsupre staras
eta kaj malgaja pli maljuna frato
kaj faligas blankajn harojn.
Ĉi tiel estas por ĉiu leontodosemo
– ordo, kiun neniu ŝanĝas:
Unue ili fariĝas fajro, poste ili fariĝas neĝo,
kaj poste maljunuloj.

De Inger Hagerup

En Esperanton – Ingegerd Granat